

**Viktor Kudrjavcev**  
**1957—2014**





Viktor Vasiljeviĉ Kudrjavcev (1957 – 2014) – elstara rusa urala esperantisto, propagandisto de Esperanto, fervora kursgvidanto, redaktoro, movada aktivulo. Tiu ĉi PDF-formata memorlibro, kreita de geamikoj kaj kolegoj okaze de la dekjara mortodatreveno de Viktoro en 2024, figuras lian personecon de homo neordinara, dediĉinta multajn jarojn de siaj vivo kaj agado al Esperanto kaj esperantista komunumo.



La tekstajn, dokumentajn kaj fotajn materialojn zorge kolektis, redaktis kaj enpaĝigis Raja Kudrjavceva (Jekaterinburgo) kaj Vladimir Opletajev (Surguto). Tekniko la projekton prizorgis Pavel Veselov (Tjumeno).

La redaktoroj esprimas sinceran dankon al ĉiuj geamikoj de Viktoro Kudrjavcev, kiuj ne forgesas lin kaj volonte engaĝiĝis en ĉi tiun eldonon, kiun oni povas konsideri ekstra numero de la revuo “Komencanto”.

Raja Kudrjavceva  
[komencanto.r66@ya.ru](mailto:komencanto.r66@ya.ru)

Vladimir Opletajev  
[surborde@mail.ru](mailto:surborde@mail.ru)

Pavel Veselov  
[pav.tmn@gmail.com](mailto:pav.tmn@gmail.com)

© Raja Kudrjavceva

Jekaterinburgo –

Tjumeno –

Surguto

Majo

2024

# Enhavo

1	Raja Kudrjavceva “Rememorante Viktoron”	4-5
2	Viktoro Kudrjavcev “Mi deziras al vi ...”	6-8
3	Vladimir Opletajev “Viktoro Kudrjavcev” (1957–2014)	9-12
4	Geamikoj rememoras: V. Aroloviĉ, O. Ŝilajeva, V. Laptev	13
5	Geamikoj rememoras: M. Bronŝtejn, S. Straŝnenko, G. Martin, S. Katsko	14
6	Geamikoj rememoras: T. Veselova	15
7	Geamikoj rememoras: V. Gusev	16
8	Geamikoj rememoras: R. Jefremov	17-18
9	Geamikoj rememoras: T. Vŝivceva, L. Jerofejeva	19
10	Geamikoj rememoras: R. Husanova	20-21
11	Geamikoj rememoras: N. Gudskov	22
12	Viktoro Kudrjavcev Neelpensitaj historioj “La sekreta ŝoseo”	23
13	Raja Kudrjavceva Neelpensitaj historioj “Pri Talino impresoj ĝis sinforĝeso”	24-25
14	Vladimir Opletajev Neelpensitaj historioj “Pasporto malaperis!”	26-27
15	Foto, 2004	28
16	Raja Kudrjavceva “Viktoro, mi kaj “Komencanto”	29-30
17	Fotoj, 2013	31
18	Vladimir Opletajev “Ĉe Diabla rokaro”	32-34
19	Fotoj, 2003	35
20	Viktoro Kudrjavcev, Raja Kudrjavceva “Neforgesebla vojaĝo al Japanio”	36-41
21	Raja Kudrjavceva “Nenio sur Tero trapasas senspure...”	42-43
22	Viktoro Kudrjavcev Tradukitaj aforismoj	44
23	Foto, 2013	45
24	Viktoro Kudrjavcev, Raja Kudrjavceva “Cervaj rojoj”	46
25	Foto, 2013	47
26	Foto, 2008	48
27	Fotoj, 2003; 2010	49
28	Fotoj, 2012	50
29	Foto, 2009	51
30	Fotoj, 2010; 2012	52
31	Viktoro Kudrjavcev “Kurtaj radi-teatraĵetoj”	53-54
32	Viktoro Kudrjavcev “Pri la ĝenro “Anekdoto”	55-56
33	Viktoro Kudrjavcev El la kolekto de ŝercoj	57
34	Bondeziroj al “Komencanto” el la tuta mondo, 2006	58-59
33	Foto, 1965-1966	60
34	Julio Baghy “Estas mi esperantisto”	61

## Rememorante Viktoron

Antaŭ 10 jaroj, la 1-an de aprilo 2014, en la 56-jara aĝo forpasis nia amiko, urala esperantisto-aktivulo, mia edzo Kudrjavec Viktoro (1957-2014). Verdire, estas nekredeble, ke jam traflugis tiom da tempo; mi perceptas ĉion tiel, kvazaŭ tio okazis antaŭnelonge, kaj en ĉiuj detaloj mi memoras tiun subitan kaj neatenditan vivfrapon. Kun Viktoro mi konatiĝis dum OrSEJT-23, okazinta en 1981 apud Taŝkento (tio estis la unua granda Esperanto-renkontiĝo, kiun mi partoprenis post mia esperantistiĝo).

Dum preskaŭ 14 jaroj ni estis geamikoj, vizitis unu la alian gaste, interkorespondis, renkontiĝis dum la tutlandaj Esperanto-aranĝoj. Nur decembre de 1994 ni decidis geedziĝi, jam estante tiam ne gejunuloj sed mezaĝaj, konsciaj homoj, kaj kune ni travivis 20 jarojn. Mi povas diri nun, rerigardante nian vivon, ke en nia vivo pli gravis amikaj interrilatoj ol la rilatoj inter edzo kaj edzino (ĝenerale mi opinias amikecon en la vivo pli grava kaj valora ol ĉiuj aliaj homaj interrilatoj kaj eĉ ol amrilatoj). Nia kunvivo ne estis ĉiam glata, ĝi havis kaj sufiĉe komplikajn periodojn, kaj ni estis tre diversaj homoj, sed ni ambaŭ ŝatis Esperanton kaj estis fidelaj al ĝi, kaj Esperanto nin tre forte ligis.

Ni strebis vivi aktive, iniciatis kaj okazigis multajn Esperanto-aranĝojn, penis unuigi uralan esperantistaron. Ĝenerale ion organizi kaj realigi kune estis multe pli facile! Ni dum pli ol dek jaroj kunredaktis kaj eldonadis nian revuon "Komencanto". Ni multe vojaĝis, partoprenante Esperanto-aranĝojn enlandajn kaj eksterlandajn. Do, nia vivo ĉiam estis interesa, eventoplena... Kaj ankoraŭ unu trajto estis komuna por ni ambaŭ: optimismo. Ni ne ŝatis plendi pri la vivobstakloj, ĉiam esperis je ĉio pli bona kaj kun la espero movis nin antaŭen. Viktoro estis tre entreprenema kaj agema homo, li neniam ŝatis trankvile kuŝi surkanape, nenionfarante. Lia kapo ĉiam estis plena de diversaj ideoj pri tio, kion fari, provi, lerni. Li multon faris por Esperanto: konstante verkis informajn artikolojn pri ĝi kaj dissendis ilin en diversajn revuojn kaj gazetojn, lanĉis siajn Esperanto-paĝarojn en sociaj retoj, kontaktis multajn esperantistojn kaj instigis ilin al kreado en Esperanto k.t.p. Li aprezis humuron, lia plej ŝatata humoristo estis Miĥail Zadornov; unu el plej ŝatataj liaj rubrikoj en "Komencanto" ĉiam estis anekdotoj kaj aforismoj. En la libroŝranko en la balkono de nia loĝejo ĝis nun estas granda stako de lia ŝatata humura



revuo "Krasnaja Burda".





Jekaterinburgo, junio 2012

Kaj jen la paradokso de la vivo: tia gaja kaj ŝercema homo lasis tiun ĉi mondon la 1-an de aprilo, en la Tago de ŝercoj kaj mistifikoj en Rusio. Mi bone memoras, kiel ni malfruvespere la 31-an de marto telefonparolis, (ĉar li deĵoris tiun tagon en la laborejo) kaj li pensis pri tio, kiel ni ŝercu kaj gaje mistifiku uralajn esperantistojn en nia dissendolisto.

Sed Viktoro bedaŭrinde jam ne povis realigi tion, ĉar Urĝa helpo matene la 1-an de aprilo forprenis lin kun la koratako kaj veturigis al kardiocentro, kie li forpasis post nur kelkaj horoj. Oni diras, ke la homo daŭras "vivi" dum oni memoras lin, des pli kiam iu daŭrigas la aferojn, kiujn li opiniis gravaj en la vivo. Okaze de la hodiaŭa malgaja memordatreveno ni hele rememoru Viktoron kaj ni daŭrigu aktivi por Esperanto en nia Uralo! Estu lia animo en paco, kaj li "ridetu" al ni de la ĉielo, aprobante niajn farojn.

Marto 2024  
*Raja Kudrjavceva*

## Mi deziras al vi ...

Mia unua scio pri Esperanto estis negativa: infanaĝe mi legis en iu libro, ke Esperanto estas “mortnaskita lingvo, destinita al fiasko”.

Komenco de mia konatiĝo kun Esperanto rilatas al la 70-aj jaroj, kiam estante studento de Politekniko, mi frekventis la urban bibliotekon pri fremdaj lingvoj por okupiĝi pri la angla (tiam modo de multaj studentoj). Foje en la salonon venis homoj, kiuj anoncis pri okazonta prezento kaj unua leciono de Esperanto. Mi certe miris, ke la “mortnaskita lingvo” tamen vivas. Evidente la prelego impresis min, ĉar mi decidis nepre ellerni Esperanton, “tiom facilan lingvon”, des pli ke la angla malbone enkapiĝis.

Ekde la komenco la lernado de Esperanto plaĉis al mi, ĝi estis kvazaŭ facila rebuso, kie oni povas montri lertecon de sia intelekto. Mi volonte vizitis la lecionojn.

Post la fino de elementa kurso oni proponis al mi viziti SEJTon. Tiusomere en 1976 ĝi okazis apud la urbo Tiĥvino, en Leningrada provinco. En pitoreska arbaro kaj preskaŭ sovaĝa naturo kolektiĝis ĉirkaŭ 300 personoj – reprezentantoj de diversaj urboj de la tuta grandega Sovetunio. Plezure pasiginte miajn somerajn feriojn en mirinda Esperanto-kompanio, mi serioze kaj porlonge “infektiĝis” kaj engaĝiĝis en esperantistan movadon. Kiajn belajn revojn donacis la juneco kaj kiun agoavidon mi havis tiam!

Reveninte hejmen, mi tuj organizis Esperanto-kurson malgraŭ ke mi ne povis flue paroli kaj tute ne sciis instrui! La sorto decidis min ekzameni. Kun mia esperantista grupo mi vizitis regionan esperantistan renkontiĝon kaj dum solena malfermo la organizantoj vokis min al mikrofono por salutparoli. Mi ĝis nun memoras tiujn dudek paŝojn al la mikrofono – ili estis por mi kvazaŭ paŝoj al eŝafodo! En mia cerbo frapis: “Post kelkaj sekundoj miaj gelernantoj ekvidos, ke ilia instruisto ne scias flue paroli! Terure!!” Eble pro tia nervostreĉo okazis tute male – mi prenis la mikrofonon kaj improvizis tute fluan salutparolon, ke oni eĉ aplaŭdis!

Tiel startis mia aktiva esperantista vivo. Mi partoprenis regionajn renkontiĝojn kaj somerajn Esperanto-tendarojn, iĝis prezidanto de esperantista klubo, mem organizis Esperantajn aranĝojn, komencis internacian korespondadon... Al miaj unuaj 30 leteroj respondis nur 6 personoj, sed mi ĝojas kaj dankas la sorton, ke inter ili estis Ralf Jalming el Gotenburgo, Svedio, kun kiu mi amikas jam 30 jarojn!

Mia unua vizitita internacia aranĝo estis TEJO-Kongreso en Krakovo, kaj la vojaĝo en Pollandon en 1987 (kiam Esperanto havis la 100-jaran jubileon) estis mia unua eksterlanda vojaĝo. Min tiam tre impresis la fakto, ke 1000 partoprenantoj el 50 landoj tute libere interparolis kaj komprenis unu la alian sen tradukistoj!



ATESTO

N-ro 48

La atesto estas donita al Kudryaovs Viktor

por legitimi, ke li/ŝi/en 1976 finis la komencan kurson de la Internacia -Lingvo Esperanto ĉe la Ĉeljabinska Esperanta klubo kaj plenumis la viŝan ekzamenon kun poento tre bone

L. P. S. Ekzamenaj komisiono: Белнев Виктор  
Шука

la 18 an de majo 1976

АТТЕСТАТ

№ 48

Настоящий аттестат выдан Кудрявцеву Виктору

в том, что он в 1976 году окончил начальное курсы международного языка эсперанто при Челябинской городской эсперанто клубе и сдал устный экзамен с оценкой отлично

М. П. Экзаменационная комиссия: Белнев Виктор  
Шука

г. , "18" мая 1976 г.

„ДВАДЦАТЬ ПЯТЬ ЛЕТ  
СТАРТОВОЙ КОМАНДЫ“



УДОСТОВЕРЕНИЕ  
Кудрявцев  
Виктор  
Васильевич

Награжден знаком

«ДВАДЦАТЬ ПЯТЬ ЛЕТ  
СТАРТОВОЙ КОМАНДЫ»

1 июля 1982 г.

Начальник стартовой команды  
Мухомов

Aparta direkto de mia agado estis koresponda Esperanto-kurso. Mi publikigis centojn da artikoloj pri Esperanto en gazetaro tra la tuta lando. Rezulto de tiuj publikaĵoj estis centoj da korespondaj kursanoj. La kurso funkciis preskaŭ 20 jarojn! Ĝuste por tiuj korespondaj kursanoj estis elpensita kaj farita modesta bulteno sub la titolo “Komencanto”, kiu dum dek jaroj kreskis el “gazeto por korespondaj kursanoj...” al la “internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj”.

Cetere mia intereso pri Esperanto ne estingiĝis dum la jaroj de mia armeservado. Mi devas rakonti pri kurioza okazo, kiam mi (tute senpermeso) forlasis la garnizonejon por almenaŭ dum kelkaj tagoj partopreni la vican SEJTon, kiu okazis tiusomere en Uzbekio apud la urbo Taŝkento. Nun




jam mi komprenas, ke tiam mi simple haste veturis al la grava vivevento, ĉar ĝuste tie mi konatiĝis kun mia estonta edzino, juna kaj entuziasma Raja – aktivulino de la Esperanto-klubo el Samarkando. Ni fariĝis Esperanto-familio kaj kune daŭrigis poresperantan aktivadon, redaktante kaj eldonante la revuon, okupiĝante pri la lingvoinstruado, organizante regionajn renkontiĝojn, partoprenante UKojn kaj aliajn internaciajn aranĝojn.

Por mi Esperanto estas ne nur lingvo, sed granda, varia, multkolora, mirinda kaj neripetebla mondo! Ĝi sendube pliriĉigas vivon de ĉiuj, kiuj trafas kaj restas en tiu ĉi mondo. Mi deziras al vi ĝui la vivon de tiu ĉi mondo!

Decembro 2007

*Viktoro Kudrjavev*



Bajkonuro, 1982



## Viktoro Kudrjavcev (08.10.1957 – 01.04.2014)

Viktor Vasiljeviĉ Kudrjavcev naskiĝis la 8-an de oktobro 1957 en la urala urbeto Niĵnjaja-Salda. Post la fino de la politeknika instituto en 1980 en la sudurala industria urbo Ĉelabinsko li fariĝis diplomita inĝeniero-elektristo. En la jaroj 1980-1982 Viktoro militservis en Sovetia armeo kiel milita inĝeniero de la fama raketa lanĉejo Bajkonuro en Kazaĥio, partoprenis kosmostartan pretigon de pli ol kvardek diversaj spacaparatoj kaj ŝipoj, preparadis raketajn startojn de unuaj eksterlandaj kosmonaŭtoj, ricevis memormedalon okaze de la 25-jariĝo de la startigejo Bajkonuro. Ekde 1986 li konstante loĝis en Jekaterinburgo.

Viktoro unuafoje informiĝis pri Esperanto kiel lerneĵano, legante la fikcian romanon de Isaj Davidov “Mi revenos post mil jaroj”, kie en tre fora estonteco Esperanto estis menciata kiel delonge formortinta planlingvo, kaj la teranoj parolis jam la tuthomaran “globan” – hibridan lingvon el la rusa kaj angla. Sed subite en 1976 li konatiĝis en la Publika urba biblioteko de Ĉelabinsko kun reale vivantaj kaj “tute neformortintaj” esperantistoj, varbantaj homojn al nova kurso de Esperanto. Estante tre scivola juna homo kaj kapabla studento, li ne povis preterlasi tiun ĉi favoran eblon ekkoni la lingvon kaj samjare en majo li finis la bazan Kurson, gvidatan de Viktoro Laptev ĉe Ĉelabinska esperantista klubo.

Somere li partoprenis la faman SEJT-18 en Tiĥvino. Jen kiel li priskribis siajn tiamajn impresojn. “La esperantista tendaro konsternis min per sia neordinara etoso, kia neniam troveblis en la instituto, Komsomolo, en aliaj institucioj de la kazernaspekta USSR. Ĉio estis saturita ĉi tie per la aero de libero kaj malstreĉiteco. La vivo fontis ĉi tie! La tendaro tiom ŝargis min energie, ke reveninte en Ĉelabinskon mi tuj organizis novan kurson de Esperanto, kvankam mi mem povis tiam apenaŭ instrui kaj paroli en Esperanto. Sed la entuziasmo agitis min ...”

Ĉu povis Viktoro kiel esperantisto resti nur senpretendema movada figuranto? Kiu konis lin bone, precipe lian karakteron, kies plej reliefaj trajtoj estis laboremo, vivĝoja entuziasmo, reala entreprenemo kaj kapablo aŭdace fronti novajn projektojn, tiu konfirmus, ke sen aktiva sinteno li apenaŭ povus memrealiĝi ankaŭ en la esperantista medio. Lia destino estis fariĝi aktiva esperantisto kaj ĝui dum sia tuta vivo Esperanton, kiu liaopinie “estis ne nur lingvo, sed granda, varia, multkolora, mirinda kaj neripetebla mondo!”

Li vigle interesiĝis pri multaj aferoj en la vivo: politikaj problemoj, kulturaj temoj, lingvaj kaj movadaj demandoj, mondvojaĝoj kaj kapablis ne blinde observi ies opiniojn kaj ideojn, sed fari memstarajn analizojn por trovi propran neafektitan starpunkton pri diversaj faktoj kaj eventoj. Tamen malgraŭ sia suverena pozicio li neniam strebis esti dominanto en la interpersonaj rilatoj kaj sciis trakti homojn amike kaj egalrajte.

Jen kelkaj respondoj de li al la demandaro destinita por persona retpaĝo.

Klereco: supera.

Fakultato: aparatkonstrua de Ĉelabinska Ŝtata Politeknika Instituto.

Vivpozicio: modera.

Vivkoncepto: sekulara humanismo.

Interesoj: la planlingvo Esperanto, sporto, aktiva ripozo, vojaĝoj.

Ŝatata muziko: trankvila, melodiplena, popola, barda.

Ŝatataj filmoj: ora kolekto de plej bonaj sovetiaj filmoj.

Ŝatataj televidaj programoj: humuraj, sprite intelektaj, ŝercaj.

Ŝatataj libroj: rusa klasika literaturo kaj multo alia.

Ŝatata sporta ludo: retpilko.

Ŝatataj citaĵoj: aforismoj.

Viktoro estis patrioto de Uralo, li ŝategis sian “malgrandan patrujon”, al kiu li fidelis ekde la infanĝo kaj ĝis la lastaj tagoj. Li serioze studis regionografion, bone sciis geografion kaj historion de la provinco, multe turismis tra pitoreskaj ĉirkaŭaĵoj de Jekaterinburgo, kelkfoje unuope boatnavigis sur la rivero Ĉusovaja. Li ne nur scipovis pasie rakonti pri la uralaj naturbelaĵoj, sed ankaŭ tentis geamikojn kaj samklubanojn al neforgeseblaj kolektivaj piedmarŝoj kaj semajnfinaj vizitoj al unikaj naturaj objektoj.

En la komenca periodo de sia agado li aktive korespondis, starigante amikajn ligojn kun multaj alilandaj gesamideanoj, danke al kiuj li faris interesajn eksterlandajn vizitojn. Krome li sukcese realigis memstare kelkajn gravajn projektojn. Pli ol dudek jarojn Viktoro gvidis propran korespondan kurson de Esperanto. Unue la kurso funkciis paperpoŝte, poste ĝi fariĝis koresponda reta kurso. Varbante al sia kurso lernantojn, li senlace publikigadis centojn da informartikoloj en la landa gazetaro. Furoran lavangon de aliĝpetoj provokis lia artikolo pri Esperanto en la populara porinfana magazino “Pioner” (Junpioniro), kies eldonkvanto (1990) atingis pli ol 4 milionojn da ekzempleroj.



Kovrovo, RET-02, aŭgusto 2002



Ĉi tiu grandskala instrua projekto generis ideon pri la eldonado de bulteno “Komencanto” por korespondkursanoj ekde 1992, sed en 1998-2009 la modesta bulteno jam populariĝis tutmonde kiel internacia revuo por komencantaj aŭtoroj kaj komencantaj esperantistoj, ofertanta komfortan niĉon al verkemuloj de pli aĝaj generacioj ol ekzemple “Juna amiko” kun ĝiaj preferataj porlernejana kaj infana celgrupoj. En 2005 Viktoro kaj lia edzino Raja laŭ la invito de la nacia Organiza komitato prezentis “Komencanton” al la 92-a Japana Esperanto-Kongreso en Jokohamo.

En la epoko de la Interreto Viktoro aktive ekuzis novajn teknikajn kontakteblecojn, lanĉinte du proprajn popularajn paĝarojn: “Koresponda Servo Universala”, kiu havas nun pli ol kvincent korespondpetintojn el dekoj da landoj; ruslingva projekto “Esperanto-plus”, prezentanta multajn informajn materialojn pri la lingvo kaj esperantista agado. Ekde la starto de la paĝaro “Ural-Siberia esperantista movado” li estis ĝia konstanta afiŝanto kaj lingva redaktoro.

Viktoro estis veterano de Rusia Esperantista Unio, multjara membro de UEA, grava organizanto de la esperantista movado kiel en la landa skalo tiel ankaŭ en Uralo. Dum pli ol tri jaroj (2002-2005) li estis estrarano de Rusia Esperantista Unio, respondeca pri la regiona agado. Sed pli frue, ekde 1988 ĝis 2001, li aktivis en la Urala Esperantista Societo, plenumis taskojn de ĝia komitatano (1988-1991, 1998-2001) kaj prezidanto (1999-2001). En 2003 li iniciatis novformatan ural-siberian esperantistan renkontiĝon EsPrimo (Esperantista Primavero), kiu dum la pasinta jardeko renomiĝis en Rusio kiel sukcesa manifestiĝo de kunagadaj laborformoj ene de grandega regiono.

La 4-an de junio 2007 en Jekaterinburgo fondiĝis junulara esperantista klubo “Arĝenta flamo” (2007-2017), al kiu la geedzoj Kudrjavcev tuj aliĝis, trovante en la jungeneracia medio novajn inspirojn kaj stimulojn. Sen ilia zorga kaj senlaca protektado la nova kolektivo ne povus tiel rapide kaj sukcese evolui.

Adiaŭa forumo iĝis por Viktoro Kudrjavcev la 10-a EsPrimo, ĉar unu monaton li ne ĝisvivis la jubilean kunvenon de ural-siberiaj esperantistoj, kiuj dum tiuj tri majaj tagoj multe sentis mankon de li. La 1-an de majo 2014 membroj de la esperantista klubo “Arĝenta flamo” dum la regiona renkontiĝo EsPrimo omaĝis al Viktoro, organizinte kortuŝan memorgesperon, dum kiu brulis kandeloj, sonis paroloj de liaj geamikoj el diversaj urboj, oni rememoris lin kiel interesan homon, patriotan civitanon, edzon, amikon, esperantiston. Krom tristo tra la kandelaj flamoj flagris la nereala sento de lia ĉeesto inter la EsPrim-anoj, kvazaŭ li nur por momento forlasis ĉiujn por tuj reveni rapidpaŝe, sprite saluti ĉeestantojn en sia neripetebla maniero kaj deklami sian ŝatatan poemon de Julio Baghy “Estas mi esperantisto” aŭ trafe aŭdigi novan gajan ŝercon aŭ aforismon el sia senfunda kolekto de saĝaj pensoj. Se li povus reveni, li dezirus al la vivantoj pace “ĝui ĉi tiun mirindan mondon de Esperanto”, kiun li mem tra la jaroj spertis plenanime, ĝue kaj senrezerve.

Majo 2014

*Vladimir Opletajev (Surguto)*





**La nomo de Viktoro Kudrjavcev estas  
aldonita al la Panteono  
de eminentaj Esperanto-instruistoj  
ĉe Edukado.net**



## Geamikoj rememoras

Estas terure skribi pri tio... La 1an de aprilo forpasis elstara esperantisto kaj nia kara amiko Viktoro Kudrjavcev. Neimageble, kiom kruele povas ŝerci nia vivo... Sincerajn kondolencojn al la vidvino Raja kaj al ĉiuj jekaterinburgaj esperantistoj! Nun por vi estas afero de honoro — malgraŭ la dolorega perdo, pluteni viaurban Esperanto-movadon sur alta nivelo. Tio estos la plej inda omaĝo al la memoro pri Viktoro.

03.04.2014

*Viktoro Aroloviĉ (Moskvo)*

Mi bone memoras la daton, kiam mi konatiĝis kun Viktor Vasiljeviĉ. Tiu estis la 17-a de decembro de la jaro 2011-a. Jes, ni estis konataj en fizika vivo nur dum sufiĉe mallonga tempo, tamen restis tiom da belaj rememoroj pri Viktoro. Mi neniam forgesos kiel varme, tute patre, li ĉiam renkontis min, kiam mi vizitis Jekaterinburgon — jen mi venis por festi Zamenhof-tagon, jen por trapasi KER-ekzamenon kaj fari marŝadon al "Diabla rokaro", jen la sekvajn jarojn mi denove venis al Zamenhof-festoj. Li ĉiam interesiĝis, kia estis mia alveno, kiom da horoj mi vojaĝis, ĉu mi estas malsata ktp. Venas al mia kapo alia ĉarma rememoro. En la erao de la Interreto, kiam plej grandan rolon en la komunikado ludas ret-mesaĝoj, Viktoro ĉiam persone telefonis al esperantistoj dum naskiĝtagoj. Estis tre agrable preni vespere aŭskultilon kaj aŭdi konatan amikan voĉon el fora Jekaterinburgo. Tio estis vere neforgesebla donaco, kiun mi gardos en mia koro la tutan vivon. Oni diras, ke Dio forprenas la plej bonajn homojn. Viktoro estis vere bona homo, entuziasma, fidela amiko, kiu ĉiam pretis helpi, solvi problemajn aferojn, konsili kaj transdoni sian sperton. Mi ĝis nun ne volas kredi lian forpason... 2014

*Olga Ŝilajeva (Glazovo, Udmurtio)*

### Memore al Viktoro Kudrjavcev

Tristas koranime ni.  
Ĝus el nia kompani'  
Kaj amatan, kaj unikan  
Mort' elŝiris la amikon.  
    Laŭ la sorto tre malica  
    Tro rapide, pretervice  
    Jen forlasis nin Viktoro –  
    Nia vera ĉefmotoro.  
Neglektante sanan krizon,  
Pri aferoj organizaj  
Agis li kun sinforĝeso,  
Zorgis pri EsPrim-sukceso!  
    Jen fervor' senprecedenca!  
    Tiu perdo senkompensa!  
    Pro merito brile ora  
    Li eternos en memoro!

03. aprilo 2014

*Viktoro Laptev (Ĉelabinsko)*

## Geamikoj rememoras

Mi ne memoras, ĉu mi konis Viktoron antaŭ mia reveno el Vorkuta; ŝajnas ke mi ne konis lin. Do la interkonatiĝo okazis ie en 1991, eĉ se ne persona, nur koresponda. Mi abonadis la revuon "Komencanto", lanĉitan de Viktoro, foje, petita de li, eĉ skribis nelongan biografian teksteton por la revuo. Kiam li decidis ĉesigi la eldonadon, mi vere bedaŭris, ĉar la revueto estis bonega legaĵo ankaŭ por miaj komencantoj. Sed mi vidis laboron de Viktoro en du EsPrimoj, kaj ĝi estis elstara! Lia inventemo kaj entuziasmo estas modelo por mi.

2014  
*Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvino)*

Mi tro malabunde kontaktis kun Viktoro persone, tamen mi admiras lian agemon kaj fidelon al Esperanto, pri kio mi riĉe eksciis el alies buŝoj. Forpaso de tiaspecaj sindonaj samideanoj ĉiam kaŭzas gravan perdon por nia rondo. Mi, kiel esperantisto, "naskiĝinta" en la ural-siberia regiono, plu esperas, ke ekzemplo de Viktoro restos valora heredaĵo por novaj generacioj.

2014  
*Sergo Straŝnenko (Rigo, Latvio)*

Viktoro Kudrjavcev estis tre aktiva esperantisto, kaj la grava redaktisto de la revuo "Komencanto". Certe la semoj, kiujn li plantis, donos bonajn fruktojn. Li mortis tro frue.

2014  
*Ginette Martin (Francio)*

Viktoro Kudrjavcev forpasis antaŭ 10 jaroj. Kaj hodiaŭ mi volas rakonti mian historion pri esperantistiĝo. En 1998 mi estis en mezlernejo kaj en iu revuo mi legis artikolon pri Esperanto, kiun verkis Viktoro. Fine de la mallonga artikolo estis propono lerni Esperanton per koresponda kurso. Mi loĝis en la urbo Kurgano, kie ne estis esperantistoj. Tial korespondaj kursoj tre interesis min. Viktoro sendis al mi instrumaterialojn kaj vortarojn. Mi plenumis la taskojn kaj sendis ilin per papera poŝto al li por kontrolo. Poste mi abonis la revuon "Komencanto" kaj eĉ verkis plurajn malgrandajn materialojn por ĝi. Dank' al la revuo "Komencanto", kaj do dank' al Viktoro, mi skribis plurajn leterojn al eksterlandaj esperantistoj kaj proponis korespondadon. Mi korespondas kun unu esperantisto el tiuj jaroj ĝis nun. Mi vere bedaŭras, ke ĝis 2014 mi ne povis renkonti Viktoron kaj persone konatiĝi kun li. Sed li ĉiam restos en mia memoro kiel la persono, kiu konigis al mi la mondon de Esperanto.

Aprilo 2024  
*Stanislav Katsko (Novosibirsko)*



## Geamikoj rememoras

Mia mirinda konatiĝo kun Esperanto komenciĝis de la artikolo de Viktoro Kudrjavcev. Foje, en 2002, mi tralegis en la loka revuo “Mejgorje” lian interesan rakonton pri Esperanto, pri tio, kia ĝi estas bela, logika kaj facile lernebla lingvo, viva kaj malkovranta novajn eblecojn. Mi ekŝatis aliĝi al la koresponda kurso, kiun gvidis Viktoro, tuj akiris la lernolibron, komencis lerni la lingvon dum paŭzoj inter sesioj en la instituto, kie mi tiam studis. Lecionoj estis allogaj kaj bone malstreĉis la nervan sistemon post la ekzamenoj. Poste mi akiris kaj legis du numerojn de “Komencanto”, kiun eldonadis Viktoro. La revuo estis maldika sed interesa. Kaj sur ĝia lasta paĝo troviĝis adresoj de esperantistoj el diversaj landoj de la mondo! Tiam mi elektis la adreson de Rikardo el Brazilo kaj skribis al li paperan leteron. Post unu monato mi ricevis respondon de li! Poste ni dum longa tempo korespondis per ordinara papera poŝto, kaj pli poste, kiam mi ekhavis retpoŝton, ni daŭrigis jam la korespondadon perrete. Kaj nun ni interŝanĝas mesaĝojn en WhatsApp, gratulas unu la alian okaze de festoj. Pasintjare li sendis al mi videon de protestoj en lia lando, kiujn ankaŭ li mem partoprenis – do, li tenas min informita pri la okazaĵoj.

Post la fino de la koresponda kurso en 2003 mi ricevis de Viktoro proponon partopreni regionan renkontiĝon de esperantistoj en Tobolsko. Mi volus aliĝi sed pro la manko de rekta trafiko de mia loĝloko Belorecko ĝis Tobolsko restis hejme. Sed kiel mi ekĝojis, kiam sekvantjare denove okazis la renkontiĝo kaj tiufoje jam en Jekaterinburgo! Des pli, ke ekzistis buso, rekte veturanta el Belorecko ĝis Jekaterinburgo. Tial mi decidis ne pretelasi la okazon kaj nepre partopreni EsPrimon-2. Mi memoras, ke mi venis en Jekaterinburgon en tre perpleksita stato, sed kun la antaŭgusto de mirindaj aventuroj. Kaj vere – mi renkontis multajn bonegajn esperantistojn tiam! Kaj la organizantoj Viktoro Kudrjavcev kaj Raja kaj ilia teamo estis bonkoraj, gastemaj, grandanimaj homoj! Mi feliĉis pasigi kelkajn tagojn en ilia varma kompanio kaj esperantista medio. Krome la renkontiĝo okazis vere sortoporta por mi: dum ĝi mi konatiĝis kun tjumena esperantisto Pavel Veselov, pli poste mi transloĝiĝis en Tjumenon, kaj ni kreis familion. Nun kreskas niaj du infanoj: Artjom kaj Marija.



Do, Viktoro por mi estas la homo, kiu malkovris al mi vivan, intereseĝan, amikecplenan mondon de Esperanto! Kaj tio iĝis la kialo de grandaj ŝanĝoj ankaŭ en mia persona vivo! Viktoro daŭre vivas en mia memoro kaj koro, kaj mi kvazaŭ atendas la sekvan Esperanto-renkontiĝon, kie ni denove intervidiĝos...

La familio Veselov gaste ĉe Viktoro kaj Raja.  
Jekaterinburgo, 1. januaro 2010

Aprilo 2024  
*Tatjana Veselova (Tjumeno)*

## Geamikoj rememoras

Viktoron Kudrjavcev mi memoras kiel homon vivĝojan, plenan de optimismo kaj scivoleman. Regule mi vizitis la multnombrajn grupajn esperantistajn kunvenojn, kiujn li sukcese organizadis, sed ankaŭ ofte mi vizitis Viktoron kaj Raja en ilia oficejo dum iliaj deĵortagoj. Mi loĝas urbocentre, kie nemalproksime de mia loĝdomo situas la Domo de paco kaj amikeco, kie ili ambaŭ laboris. Ĉar mi havas la kutimon multe promeni tra la urbo piedire, mi plezure faris tion, kaj fine de la promenado venadis al ilia laborloko. Ni bonege teŭmadis kune, gaje babilante kaj interŝanĝante novaĵojn. Viktoro ĉiam estis ŝercema, li ŝatis rakonti anekdotojn kaj gajigi min kaj Raja. Nin ankaŭ unuigis komuna intereso pri turismo. Mi estas longtempa kaj arda turisto, vizitis kaj vidis multajn lokojn de Uralo kaj de nia Sverdlovska regiono. Viktoro ĉiam pridemandis min pri iuj turismaj itineroj, volis scii pri ĉiuj etaj detaloj. Kiam li poste sukcesis viziti tiujn lokojn, pri kiuj ni interparolis antaŭe, li vigle rakontis al mi pri ĝojoj de siaj malkovroj kaj pri diversaj aventuroj, kiuj okazis dum tiuj planitaj turismaj marŝoj, montris fotojn, faritajn dum ili. Bedaŭrinde tiutempe mi ne povis esti kompaniano de li, ĉar mi ne povis lasi hejme mian malsanan patrinon sola sen prizorgo. Sed kiam Viktoro pasie transdonis al mi siajn impresojn de tiu turismado, ankaŭ mi kvazaŭ ree travivadis tiujn belegajn momentojn...

*Majo 2024*

*Vjaĉeslav Gusev (Jekaterinburgo)*



Esperantista renkontiĝo "Aŭtuna kuko". Jekaterinburgo, la 9-an de novembro 2013



## Geamikoj rememoras

Kun Viktoro Kudrjavcev mi konatiĝis dum renkontiĝoj de esperantistoj en la jaroj 2011-2012. Kiam mi kaj Olga Ŝilajeva gvidis Esperanto-kursojn en Glazovo, ni veturis kun granda grupo de gelernantoj decembre por partopreni Zamenhof-tagon en Jekaterinburgo. Poste mi kelkfoje partoprenis la regionan renkontiĝon "EsPrimo". Dum ĉiuj eventoj Viktoro estis motoro kaj gvidis, kunordigis grandan parton de la programo. Li ĉiam tre aktive partoprenis multajn programerojn, inkluzive intelektajn kaj lingvajn ludojn, kiujn mi organizis dum aranĝoj. Do mi certe memoras Viktoron kiel ageman homon kun akra saĝo kaj bona humursento.

Dum unu el niaj interparoloj evidentiĝis, ke Viktoro devenas el la urbo Niĵnjaja-Salda, kie loĝis multaj generacioj de mia familio, kie naskiĝis mia patrino kaj kie ĝis nun loĝas mia avino kaj pluraj parencoj. Loĝantoj de tiu urbeto estas iom specialaj homoj kun koncerna vivsento, ĉarma provinca inteligenteco kaj spriteco. Ili nomas sin "saldamanoj" kaj ofte estas "kestoj de popola saĝo". Ĝuste tia estis mia avo, kaj Viktoro ofte memorigis lin al mi per sia konduto, vere "saldamana" maniero pensi, paroli kaj agi.

Kiam Viktoro forpasis, mi partoprenis la funebran ceremonion. Parolante kun Raja, mi diris, ke mi kredas je reenkarriĝo de animoj kaj je tio, ke Viktoro tre baldaŭ naskiĝos denove, ĉar tiom energiplena kaj agema animo ne povas longe prokrasti la restadon "ekster la mondo". Tiam mi ankoraŭ ne sciis, ke post 1,5 jaroj naskiĝos mia filo kaj... ke li havos la nomon Viktoro. Kvankam ni donis tiun nomon al la bebo ne omaĝe al Viktoro Kudrjavcev aŭ iu alia konkreta homo, sed eble dum la pensado pri la nomo rememoroj pri la homo kun tiom forta spirito iom influis min.

Post kelkaj jaroj malgranda Viktoro kun aliaj miaj gefamilianoj gastis en Jekaterinburgo ĉe Raja Kudrjavceva, ni daŭrigas kontaktojn, kaj mi foje rememoras pri tiuj interesaj kaj eventoplenaj Esperanto-festivaloj en Uralo, kiujn organizis Raja kaj Viktoro.

Aprilo 2024

*Roman Jefremov (Glazovo, Udmurtio)*



KER-ekzameniĝintoj kun atestiloj. Zamenhof-festo.  
Jekaterinburgo, decembro 2012



## Geamikoj rememoras



Zamenhof-festo. Viktoro Kudrjavcev parolas. Jekaterinburgo, decembro 2012



Aleksandr Osincev enmanigas al Viktoro ateston pri la sukcesa KER-ekzameniĝo.  
Jekaterinburgo, decembro 2012



## Geamikoj rememoras

Dum nia vivo ni kontaktas diversajn homojn, kaj kun ĉiu persono havas apartajn kontaktojn: intimajn, amikajn (malamikajn), ideajn, laborajn. Ankaŭ miaj kontaktoj kun “neforgesebla amiko Viktoro – en la programeroj bonega aktoro” specife diferencis de iuj aliaj. Apenaŭ mi rememorus iujn aparte interesajn (des pli por novaj samideanoj) historiojn, ligitajn kun li. Ni banale konatiĝis dum iu vica regiona renkontiĝo, kiuj abundis en la 80-aj. Obsedita de la ideo de “verda lingvo”, Viktoro aktive partoprenis “verdajn vivon”. Senrifuzo, amikema, bonkora – tian lin mi memoras.

Dum la rigidaj 90-aj jaroj li, unu el nemultaj, ne lasis labori por la “verda ideo” – verkadis artikolojn, gvidis korespondajn kursojn, prezentadis rusian esperantistaron dum eksterlandaj renkontiĝoj, ktp. Ĝuste li kaj Raja komence de la 2000-aj revivigis regionajn renkontiĝojn kaj dum deko da jaroj organizadis kaj aktive partoprenis ilin. Li mastrumis “Komencanton”, kun kiu mi kunlaboris laŭ lia invito. Ni estis bonaj amikoj, multfoje preparolis la organizadon de diversaj programeroj, li subtenis min, helpis laŭbezone... Fakte ĉio-ĉi estas ja konata. Por nemultaj samideanoj Esperanto estas la vivo. Viktoro vivis per kaj por Esperanto, kaj ĝuste en tiu aspekto ni ĉiuj nun rememoras lin.

Aprilo 2024

*Tatjana Vŝivceva (Miasso)*

Estas vere nekredible, ke jam forflugis dek jaroj. La sorto estas tro maljusta, ĝi prenas al la ĉielo la homojn, kiuj kapablis fari multe, interese, entuziasme kaj kiuj povis ĝui la vivon! Sendube, optimismo, karismo, ebleco labori insiste kaj persiste por Esperanto senlace, senlaŭde, sendorme, senpage... kaj neniam plendi pri iuj obstakloj, vivcirkonstancoj, vivi modeste kaj ne envii al pli prosperaj homoj – tio estis evidentaj trajtoj de Viktoro Kudrjavcev. Li elstaris kiel aparta esperantisto, kiu interesiĝis pri diversaj sferoj de la vivo, scienco, naturo. Unuvorte, scivolemulo. Kaj ege aganta homo. Ni konas multajn scivolemulojn, tamen nemalmultaj el ili preferas kuŝi sur komforta divano kaj atendi, ke Viktoro iniciatos, organizos, invitos ĉiujn kaj persvados partoperni iun eventon. Viktoro ĉiam emis helpi homojn, kiam tio bezonatis. Foje, mi devis veturi al Jekaterinburgo pro serioza sanproblemo, kaj Viktoro tuj pretis helpi min... Por marta Esperanto-sumoo 2024 mi serĉis libron por legado kaj hazarde trovis la Informleteron de uralaj esperantistoj “Ekzakte” 1999, N<sup>o</sup>1. Ho, sur la kovrilpaĝo mi trovis la foton de Viktoro kaj mi!

Mi renkontis Viktoron la unuan fojon en oktobro de 1985 en nia pedagogia instituto, kien la grupo de uralaj esperantistoj venis al Niĵnij-Tagilo por informi pri Esperanto kaj varbi novajn kursanojn. Mi ĉeestis tiam la renkontiĝon kaj post la konatiĝo kun esperantistoj mi tuj komprenis, ke en mia vivo mankas Esperanto. Estas domaĝe, ke la vivo de Viktoro finiĝis abrupte tro frue, tamen lia vivo kaj liaj faroj restos en nia memoro, dum ni estas sur Tero.

Aprilo 2024

*Helrememore kaj triste en la koro,  
Lidija Jerofejeva kaj Sergej Potoskujev (Niĵnij-Tagilo)*

## Geamikoj rememoras

Kun Viktoro Kudrjavcev, same kiel kun lia estonta vivamikino Raja, mi konatiĝis en 1981 dum OrSEJT-23 en Sukok, apud Taŝkento. Al esperantista tendaro en Uzbekio ni veturis el Sverdlovsko grandteame. Viktoro venis tien nur por kelkaj tagoj, ĉar li tiutempe militservis en Kazaĥio, ĉe Bajkonuro, kaj povis lasi



la garnizonejon nur por du-tri tagoj. Do, mi memoras kiel Viktoro alvenis al nia esperantista sverdlovska grupo kaj diris, ke ankaŭ li estas uralano, nur el Ĉelabinsko. Kiom mi scias, post la fino de sia armeservado li revenis en Ĉelabinskon kaj aktivis kiel esperantisto tie, sed ofte vizitis niajn Esperanto-aranĝojn en Sverdlovsko kaj plene translokiĝis ĉi tien nur en 1986.

Raja kaj Viktoro kun geamikoj. Uzbekio, OrSEJT-23, 1981

Ankaŭ ĉi tie Viktoro restis tre aktiva kaj entreprenema persono. Mi bone memoras jarojn, kiam li, interkonsentinte pri la ejo en la palaco de fervojistoj, gvidis tie Esperanto-kurson. Ni estis tiam junaj kaj ŝatis multe turismi. Kutime ni kolektiĝis vendrede vespere en la palaco, estis jam anticipe decidite, kiu kion kunprenos en la dorsosako (ĉu kaĉojn, ĉu ladmanĝaĵojn aŭ aliajn bezonataĵojn dum la vojaĝo), kaj ni veturis per elektotrajno ĝis la fervojhaltejo Ŝalja. Tien venadis same per elektotrajno esperantistoj el Permo. Viktoro tiam tre amikiĝis kun la perma esperantisto Firdaus Kasimov, kiu gvidis la klubon de permaj esperantistoj, kaj du amikoj organizadis tiujn interurbajn semajnfinajn renkontiĝojn. Ŝalja, situanta ĉe la rivero Silva (СЫЛВА), estis tre pitoreska loko, ni starigis niajn tendojn ĉe la riverbordo, faris lignofajron, kuiris en la kaldrono bongustan supon aŭ kaĉon, plezure kunripozis, gaje babilante kaj kantante akompane de gitaro, naĝis en Silva. Tio estis vere admirindaj semajnfinoj en la naturo!





## Geamikoj rememoras

En mia malnova fotoalbumo mi trovis nigra-blankajn fotojn el ankoraŭ unu nia kuna memorinda vojaĝo al Tjumena esperantista renkontiĝo “Tendareto”, kiun organizis Vladimir Izosimov. Ĝi okazis antaŭ tridek jaroj, en 1994, ĉe tjumenaj varmegaj fontoj, kaj tien ni veturis triope: Viktoro, mi kaj mia edzo Igorj Husanov. Kune kun Volodja Izosimov tiun renkontiĝon partoprenis bonega kompanio de tjumenanoj: Aleksandr Kalaŝnikov, Nadeĵda Ŝeveljova, Dilara Gadirova, Mansur Mamkin kaj multaj aliaj gejunuloj. Agrablegaj tagoj, pasigitaj kune en la ĝoja esperantista kompanio!



Tendareto apud Tjumeno, 1994

Mi memoras Viktoron dum ĉiuj niaj kunvojaĝoj kiel tre komunikeman, vivĝojan, humurplenan homon, helpopretan kaj fidindan amikon! Ankaŭ en la urbo ni multe kaj sukcese kunlaboris por Esperanto. Nin ligis bonega amikeco dum multaj jaroj, mi povas ankaŭ diri, ke mi estis la unua, kiun el esperantistoj vizitis Viktoro kaj Raja jam kiel geedza paro, iom poste Viktoro kunveturigis Rajan al Permo por konatigi ŝin kun sia amiko-esperantisto Firdaus... Mi tre bedaŭras pri la frua forpaso de Viktoro... Kaj mi daŭre amikas kun Raja.

*Majo 2024*

*Rita Husanova (Jekaterinburgo)*

## Geamikoj rememoras

Viktoro Kudrjavcev estis unu el la plej admirindaj personoj de nia movado, precipe grave aktiva en la 1990-aj – 2000-aj jaroj. Parenteze, sed treege grave: en la aktivado li estis nedisigebla de sia edzino Raja, kaj kio nome estas lia, kaj kio ŝia persona merito, ne distingeblis, ili faris ĉion kune, kiel unu dukapa persono! Post lia forpaso Raja daŭrigas la agadon sola, sed plu tre sukcese.

La informa agado de Viktoro kaj Raja estas nekomparebla. Ili sukcesis publikigi artikolojn pri Esperanto en multaj tutlandaj kaj regionaj ĵurnaloj, kie ili invitis al korespondaj kursoj. Do, la interesitoj en Uralo kaj apudaj regionoj povis informiĝi kaj eklerni Esperanton. Rezulte, la skalo de koresponda instruado estis grandega. Jes, tiutempe estis favora periodo por korespondaj kursoj, kaj funkciis pluraj similaj aferoj, sed laŭ la denseco de lernantoj kaj daŭro de la funkciado ilia agado estis, eble, la plej elstara.

La dua afero estis la ĵurnalista agado de la paro. Komence de la 1990-aj ili ekeldonis modestan kaj amatoraspektan gazeteton "Komencanto". Sed poste, kiam la sperto akumuligis kaj kreskis la teknikaj eblecoj, ili rekomencis sub la sama titolo tre bonan, enhavriĉan samtitolan revuon, en kiu degnis kunlabori la plej eminentaj esperantistoj de la mondo, kaj ĝi eniris la vicon de internacie agnoskataj kaj estimataj revuoj.

La sekva direkto de laboro de Viktoro kaj Raja estis organizado de renkontiĝoj - regionaj kaj, unufoje ankaŭ landa. Nu, la regionaj uralaj renkontiĝoj ĉiam ricevis bonajn reeĥojn de rusiaj esperantistoj, ilin volonte partoprenis ankaŭ homoj el aliaj regionoj. Pro tio dum la 23-a REK en Volgogrado februare de 2004 Viktoro eniris la Estraron de REU ĝuste kiel respondeculo pri regiona agado - ja pri tiu direkto de la laboro li estis konsiderata la plej kompetenta persono. Kaj REK-24 en Jekaterinburgo, ĉeforganizintoj de kiu en aprilo de 2005 estis ĝuste la familia paro, estis memorinda evento, ĉar unue ĝi estis dediĉita al la 40-jara jubileo de SEJM, kaj veteranoj de SEJM estis tiam invititaj partopreni ĝin. Due, okazis tiam multaj enhavriĉaj diskutoj kaj oni vere trovis iujn vojojn, kiuj ne permesis pereji al la movado en la nova komplika 21-a jarcento...

Ĉio tio ŝuldis al vere malfermita karaktero de Viktoro, lia bonvolemo kaj inteligenteco. Kun li eblis komunikiĝi en neformala etoso kaj pri ĉiutagaj, kaj pri seriozaj aferoj egale, kaj foje ĝuste dum tiaj interparoloj naskiĝis iuj ideoj, kiujn Viktoro poste plenumis, tiom sukcese, kiom permesis la cirkonstancoj.

Majo 2024

*Nikolao Gudskov (Moskvo)*



N. Gudskov, V. Kudrjavcev  
Puŝĉino, REK-22, decembro 2002



## La sekreta ŝoseo

Tiu historio okazis antaŭ dudek jaroj. Mi tiam servis armeon kiel leŭtenanto en milita regimento, kiu okupiĝis pri la preparado de kosmaj ŝipoj por starto. Ĝuste nia regimento okupiĝis pri tiel nomataj “civilaj”, ne militaj objektoj. Tiam inter Sovetunio kaj aliaj landoj aperis modo sendi en la kosmon internaciajn teamojn. Mi servis ĝuste en tiu periodo, kiam flugis en la kosmon soveta - hungaria, -bulgaria, -mongolia, -vjetnamia teamoj... Venis vico por francaj kaj fine usonaj astronautoj. Devis veni al nia kosma starto la prepara teamo el Usono, multaj gravaj personoj. Neniam antaŭe piedoj de “eventualaj kontraŭuloj” paŝis sur la teritorio de tiu supersekreta milita objekto.

Por gardi la gravajn eksterlandanojn de ajnaj incidentoj oni kaŝe dislokis laŭ la ŝoseo, iranta al la raketa startigejo sekretajn grupojn, konsistantajn el unu oficiro en civila vesto kaj du soldatoj. Mi eniris unu el tiuj grupoj.

Jen mi kaj miaj soldatoj okupis nian lokon, pli-malpli kaŝis nin kaj atendis la fiksitan tempon de la preterveturo de la “aŭto-kavalkado”. Kiam ĝis la indikita tempo restis dudek kvin minutoj, subite el la stepo aperis malgranda buso, kiu laŭ la grunda vojo proksimiĝis al la ŝoseo. Mi tuj haltigis la buson kaj klarigis, ke plu veturi ne eblas. Tio estis brigado de konstruistoj, ili rapidis al manĝejo por tagmanĝi. Post miaj klarigoj ili komprenis, ke atendi necesas pli ol duonhoron, kaj tiam ili certe malfruos... Brigadestro komencis petegi min lasi ilin plu veturi, kaj mi, ho ve!, permesis! La buso startis, supreniĝis al la ŝoseo kaj... ties motoro eksilentis. La ŝoforo provis funkciigi la motoron, sed vane, la buso ne deziris veturi!

Teruro senmovigis miajn krurojn. Ĝis alveno de eksterlanda delegacio restis nur dek minutoj... kaj meze de la ŝoseo staras senmove fremda buso, kies aperon mi neniukaze devis permesi! Kion fari?



El mia gorĝo eksonis la kriego: “Puŝu, puŝu ĝin per manoj, diable, ... ble!” La brigado, mi kaj miaj soldatoj ekpuŝis la buson per niaj fortoj for de la ŝoseo. Ni sukcesis movi la buson je dudek metroj for de la ŝoserando kaj, iom trankviliĝinte, enspiris.


Apenaŭ ni sukcesis ekfumi por trankviliĝi, ekblinketis la signallampoj de la eskortaj policistoj, kaj la grava eksterlanda delegacio “preterflugis” nin kaj malaperis. Multaj jaroj pasis, sed ĝis nun mi detale memoras tiun ĉi neelpensitan okazaĵon.

2002

*Viktoro Kudrjavcev*

## Pri Talino impresoj ĝis sinforgeso

Ni ambaŭ: kaj Viktoro, kaj mi estis vojaĝemaj, kaj vojo ofte logis nin veturi en. En nia vivo ankoraŭ je etapo de nia amikeco estis unu kuna vojaĝo al Ĉebaltio, kiun mi aparte memoras pro ĝiaj aventuroj kaj surprizoj. Okazis tio en sovetia tempo, somere de 1982, kiam ni decidis renkontiĝi en OkSEJT-24 en Lapmeĵciemso apud Jūrmala. Viktoro venis tien post la fino de sia armeoservado ĉe Bajkonuro, mi alflugis el Uzbekio. Nur kurte, punktolinie mi skribu, ke tio estis belega tutlanda esperantista renkontiĝo en tre pitoreska loko. Mi bone memoras tiujn mirindajn tagojn, travivitajn en lignaj dometoj, ĉirkaŭitaj de altegaj pinoj; sablajn plaĝojn ĉe la marbordo, kriojn de mevoj, odoron de marbrizo, miksitan



kun la pinodoro... Kaj matenajn kunvenojn kun la sprita ĉefo de la verda polico Mikaelo Lineckij kaj liaj punanoncoj pro la rompo de la lingva disciplino; tagajn lingvoperfektigojn, belegajn vesperajn koncertojn kun elstaraj Esperanto-kantistoj: Natalja Berce, Leonid Borisov, mizikensemblo de V. Soroka, Marina Korotj k.a. kaj noktojn apud la lignofajro ĉe la bordo de Balta maro.

Post la fino de la renkontiĝo Viktoro kaj mi ekŝatis viziti Rigon kaj Talinon por vidi ĉi tiujn belegajn urbojn. Ni facile atingis la ĉefurbon de Latvio, plezure promenis tra la labirinto de ŝtonpavimitaj stratetoj kaj placoj de la malnova urbo, vizitis la faman preĝejon de la Sankta Petro, konatan ankoraŭ de bildkartoj kaj libroj pri la urbo; haltis apud la monumento al bremenaj muzikistoj por froti la nazojn de bestoj (kion oni opinias bona signo por la estonta feliĉo); trovis la konatan arkitekturan komplekson “Tri fratoj”. Post tia intensa promenado ni malsatiĝis kaj jam revis pri bona tagmanĝo. Tiumomente Viktoro decideme diris, ke li invitas min en bonegan restoracion, kiu ĝuste plaĉos al mi, kaj ekgvidis min tien. Necesis vidi mian miron, kiam ni atingis la bezonatan lokon! Ni eniris en la luksan restoracion, kie ĉio estis aranĝita en uzbekia stilo: kaj la dezajno de la halo por gastoj, kaj la tuta uzata bela manĝilaro, kaj eĉ la kelnerinoj, simpatiaj lokaj virinoj-blondulinoj estis vestitaj en belaj naciaj uzbekaj roboj kaj kun uzbekaj verŝoĉapoj surkape. Vere ne atendita surprizo por mi! La pladoj estis bongustegaj kaj tre satigaj! Sonis agrabla orienta melodio. Ni plenĝuis la agrablan tagmanĝon, kaj bone ripozinte, daŭrigis poste nian konatiĝon kun la urbo, vizitante la ĉefan urban Doman katedralon kaj promeninte laŭ la novkonstruita bela ponto super la rivero Daŭgavo.



Malfruvespere ni devis forveturi per trajno al Estonio. La nokton ni bone pasigis, dolĉe dormante en la kuŝvagono de la trajno, kaj matene estis jam en Talino. Ankoraŭ unu neforgesebla tago, pasigita en la ĉarma ĉebalta urbo! Ĉi tie ni vidis belan urban domon kaj apudan placon, kie pasas ĉiuj urbaj festoj kaj foiroj; promenis en la supra (Tompeo) kaj la malsupra (malnova urbo) urbopartoj: vizitis la konatan parkon kun la nomo “Ĝardeno de dana reĝo”; iris vidi la urban arkitekturan ensemblon “Domo de tri fratinoj”, la katolikan preĝejon de la Sankta Nikolao kaj la ortodoksan katedralon de Aleksandr Nevskij. Nin impresis multegaj mezepokaj turoj de la urbo, ĝiaj pordegoj kaj ĝia krea urbeto.

Krom la diversaj vidindaĵoj de la urbo ni sukcesis viziti iun vendejcentron kaj mi eĉ aĉetis tie belan mantelon por mi kaj iujn ĉebaltajn memordonacojn kaj la sakon kun tiuj aĵoj ni decidis lasi en la deponejo de la fervoja stacidomo, de kie ni planis vorveturi malfruvespere reen al Rigo. Ni iris al iu kafejo, poste ankoraŭ promenis ie en la urbo. Fine ni venis al nia nokta trajno, envagoniĝis kaj ekveturis. Eble pasis unu horo aŭ pli, dum kiuj ni pace teumis en la vagono kaj vigle babilis pri diverso kaj subite mi rememoris, ke mia sako kun la novakirita bela mantelo kaj aliaj aĵoj restis forgesita de ni en la deponejo. Certe mi ĉagreniĝis ... Kaj Viktoro diris: “Mi pensas, ke vi bedaŭros lasi viajn aĵojn en la talina stacidomo, ni eltrajniĝu kaj revenu preni ilin”. Decedite – farite: ni elvagoniĝis en iu malgranda stacio dum la baldaŭa halto de la trajno, estis jam nokto kaj elektrotrajnoj reen al Talino jam mankis. Kion fari? Ni eniris en la negrandan stacidomon, kie krom la deĵoranta biletkasistino plu neniu estis. Rakontinte nian historion al tiu virino, ni petis ne peli nin eksteren, sed permesi pasigi la nokton en la stacidoma atendohalo ĝis la frua mateno, kiam veturos la unua elektrotrajno ĝis la ĉefurbo. Bonkora virino permesis resti, fermis la pordon kaj foriris mem ripozi. Mi kaj Viktoro, tre lacaj post la aktiva vojaĝtago, kuŝis ĉiu sur la apudaj benkoj kaj estis kontentaj, ke eblis etendi la piedojn kaj iom ripozi, kvankam sur ne tre komfortaj kaj duraj kuŝlokoj. Eĉ en tiuj kondiĉoj ni tuj endormiĝis pro la laco. Sed proksime al la mateniĝo en la ejo iĝis senteble malvarme. Mi preskaŭ tremis pro la malvarmo, kiam Viktoro, ekpensinte pri mi kun la kompatato, venis, kuŝis apude kaj zorgeme brakumis min, penante iel varmigi min... Tiel ni rezisteme ĝisatendis la unuan matenan elektrotrajnon, per kiu sukcese revenis en Talinon.

Neatendite la sorto disponigis al ni ankoraŭ unu tagon de la restado en tiu bela urbo! Ni, certe, ne perdis la tempon vane, vizitis la urban maran muzeon, kaj ankaŭ subĉielan etnografian muzeon, promenadis tra haveno, kaj vespere, ne forgesinte preni la sakon el la deponejo, denove entrajniĝis kaj ĉi-foje sukcese revenis en Rigon, de kie ni iom poste disflugis al siaj loĝurboj: Viktoro – al Uralo, kaj mi flugis en Taŝkenton. De la tempo de tiu ĉi historio pasis jam 42 jaroj, sed mi klare memoras tiun ĉi impresan vojaĝon!

Aprilo 2024

*Raja Kudrjavceva*

## Pasporto malaperis!

Antaŭ dek jaroj, la 1-an de aprilo 2014, nia amiko, kolego, samideano Viktoro Kudrjavcev forlasis la vivantojn. La kalendaro forfoliumas la jarojn nerimarkeble sed en la ritmo neeviteble kontinua kaj senpasia. Oni diras: "Tia estas la vivo." Sed la koro kaj animo malakceptas kaj neglektas tian ĉi ordon, eĉ protestas kontraŭ ĝi. Ĉar post deko da jaroj Viktoro restas kun ni ĉiuj, kiuj konis, amis, estimis lin, kunlaboris kaj amikis kun li. Viktoro tre mankas en nia rondo nun, sed li daŭre ĉeestas ĝin en niaj faroj, ideoj, pensoj, rememoroj. Hodiaŭ mi prezentas al vi neelpensitan historion, kiu okazis al Viktoro, Raja kaj mi antaŭ dudek jaroj en la flughaveno de Pekino.

Somere de 2004 Viktoro, Raja Kudrjavceva kaj mi vojaĝis al Pekino, kie okazis la 89a Universala Kongreso de Esperanto. La vidinda ĉefurbo de Ĉinio, interesaj kongresa kaj ekskursaj programoj multe emociis nin kaj gravuris en la memoro neforgeseblajn travivaĵojn. Sed ĉu bedaŭrinde aŭ ĉu bonŝance ankaŭ ridindaj, amuzaj kaj eĉ mistikaj okazaĵoj dum la restado en Pekino ne unufoje konfuzis nian triopon.

Mi volas rakonti unu el tiuj historioj. Ni estis atendantaj rean flugon de "Aeroflot" el Ĉinio al Moskvo en la grandega, moderna, luksa Pekina flughaveno. Ĉe la pasaĝerregistra giĉetejo ni donis al oficisto niajn pasportojn kaj flugbiletojn por ricevi aviadilajn enirpermesilojn. La afero pasis rapide kaj senprobleme. Ni, rericevinte ĉiujn paperojn kaj dokumentojn, senzorge babilis, kontentaj, ke ni sen malfruo atingis la flughavenon kaj senpene registriĝis al la flugo. Ĉirkaŭ horo restis



ĝis ekflugo, ni decidis akurate meti dokumentojn en brustopoŝon, ĉar ni devis prezenti ilin ankoraŭ dufoje por lim - kaj dogankontroloj.

En ĉi tiu momento mi subite konsternite konstatis, ke en mia mano mankis mia ruĝkovrila pasporto. Ĝi ne estis! Ĝi ne estis en ĉiuj miaj poŝoj nek en la mansaketo. Ĝi ne kuŝis surplanke apud ni. La pasporto malaperis!

Reveninte al la registristo, mi per signoj petis, ke li redonu al mi mian pasporton. Interkompreniĝi ni povis en neniun lingvo. La junulo ne parolis ruse kaj same per signoj, prezentinte al mi la malplenajn manplatojn, kun absolute neŭtrala mieno sciigis, ke li havas neniujn dokumentojn. Katastrofo nekredibla! Mi pli emfaze kaj insiste ripetis mian postulon, sed la ĉino same senemocie per gestoj komunikis al mi, ke neniun pasporton li havas kaj ke prefere mi ne devas kondukti kiel teda muŝo.



Tiumomente mi decidis aroge veni malantaŭ la servotablon kaj tie inter paperoj trovi mian pasporton. Sed kiam mi rigardis en la internon de la giĉetejo, mi denove ŝokiĝis, ĉar mi vidis tie neniujn paperojn, eĉ unu paperfolieto ne estis tie, meze de la tableto solecis nur komputila monitoro. La pasporto ne estis, ĝi malaperis senspure! En ĉi tiu sekundo mi spertis neimageblan emocian frapon, kiu panikis kaj malekvilibrigis min ĝis preskaŭ senkontrolata sveno. Raja kaj Viktroro tenis en la mano siajn pasportojn, sed la mia en nia triopa ĉeesto neniĝis en maniero nekomprenebla! Mi perpleksiĝis tiel forte, ke mi en mia stupora stato tute ne kapablis sobre analizi la okazaĵon kaj apenaŭ ion dedukti-indukti. Baldaŭ miaj geamikoj forflugos al Moskvo, kaj mi devos resti en fremda lando sen dokumentoj, sen mono, eĉ sen eblo klarigi al polico versimile la teruran misaventuron, ĉar ĉine mi ne povis paroli! Kion fari, kion entrepreni? Tiuj ĉi pensoj kaj rezonoj elĉerpis miajn rezistofortojn kaj preskaŭ plene dampis mian entuziasmon.

Vidante mian plagan embarason, ankaŭ la geedzoj Kudrjavec maltrankviliĝis, sed ili klopodis min trankviligi kaj devigis min ankoraŭfoje traserĉi ciujn poŝojn kaj mansaketojn. La rea traserĉo estis senrezulta, kaj tio pliigis mian senesperigon. Ankaŭ Viktoro kaj Raja rekontrolis siajn paperojn kaj dokumentojn kaj konvinkiĝis, ke ili estas en ordo. Viktoro, dezirante zorge meti ilin en suban poŝon de sia veŝto, subite haste kaj nerveze ekmovis la fingrojn sur ŝtofo, sub kiu li palpsentis iun libretforman objekton. Jen miraklo! Nepriskribebla magiaĵo! Li tiris el la poŝo pasporton, kaj montris al ni en sia mano du rusiajn pasportojn. Kiel vi opinias, kies pasporto estis la dua, akaparita de nia kunvojaĝanto? Ĝi estis mia perdita pasporto! Deponita en la poŝo de Viktoro ĝi povis bonorde reveni al Moskvo sen mi. Sed kion mi sendokumenta, posedanta eksdatiĝantan turistan vizon, farus en fremda lando? Post la spertita afekcio tian ĝuan ondon de feliĉo mi sentis nur kelkfoje en mia vivo, kaj unu el tiuj beataj raraj momentoj trafis min en la pekina flughaveno post la reakiro de mia identiga dokumento.

Kiel povis Viktoro kunpreni du pasportojn? Li tion ne povis komprenigi al si mem. Ni triope provis trovi probablajn klarigojn de ĉi tiu okazaĵo kaj konkludis, ke unue kulpis manko de necesa parolkontakto kaj komuna lingvo inter oficisto kaj registrataj pasaĝeroj. La registristo ne povis paroli kun ruslingvaj vojaĝantoj, supozeble ankaŭ la anglan li ne komprenis. Alia klarigo fontas el etnaj specifecoj de ĉinoj kaj rusoj. Eŭropanoj ofte konsideras ĉinojn vizaĝaspekte similaj unuj al aliaj. Same ĉinoj ne ĉiam povas adekvate distingi kaj identigi eŭropanojn, konsiderante kaj komparante foton kun vizaĝo de reala homo.

Marto 2024

Vladimir Opletajev







Moskvo, aŭgusto 2004



## Viktoro, mi kaj “Komencanto”

Mi ŝatus rakonti pri la projekto, kiu estis elpensita de Viktoro kaj poste iĝis por mi kaj Viktoro sukcesa projekto komuna. Eble ĝi sukcesis ĝuste tial, ke ni enmetis en ĝin duoblan energion, amon kaj fortojn! Bone mi memoras, kiel aperis la ideo eldonadi la revuon.

Viktoro estis tre iniciatema kaj agema homo kaj aktiva esperantisto. Dum pluraj jaroj li senlace propagandis la lingvon, dissendante multegajn informajn artikolojn pri Esperanto al diversaj redakcioj de sovetiaj kaj rusiaj periodaĵoj kaj poste instruis la lingvon al interesiĝintoj per la koresponda Esperanto-kurso. Kiam ni geedziĝis decembre de 1994, ankaŭ mi komencis helpi al li en la instruado, kontrolante skribajn hejmajn taskojn kaj respondante al demandoj de la kursanoj. Krome tiam ni surbaze de la urba lingva liceo en Jekaterinburgo organizis kaj kune gvidis ankaŭ ĉeestan bazan kurson de Esperanto. La koresponda kurso de Viktoro seninterrompe funkciis pli ol 20 jarojn. Dum la jaroj de la instruado ni ofte meditis kaj parolis pri tio, kial multaj homoj lernas la lingvon, sed post la kursoj ien malaperas, ne restas en la movado kaj ne plu progresigas siajn lingvokononjn. Ni ambaŭ inklinis al la ideo, ke necesas proponi al niaj novuloj iel praktike apliki la ricevitaĵajn sciojn, kaj ju pli frue ili tion farus, des pli tio bonus. Tiel aperis la ideo provi eldoni specialan revuon por komencantoj, kie ili povus legi ne tre ampleksajn sed interesajn kaj allogajn tekstojn. Sed ni volis, ke “Komencanto” servu ne nur kiel legaĵo por komencantaj esperantistoj, sed iĝu ankaŭ la metiejo, kie ili povu ion traduki aŭ verki originale kaj vidi ankaŭ proprajn publikigitajn provojn. Ni proponis al komencantoj traduki almenaŭ unu-dufrazan amuzan ŝercon aŭ anekdoton, iom poste jam pli grandan tekston, rakonton, historion. Do, ni klopodis, ke la revuo havu la taskon kuraĝigi la novulojn ion krei memstare. Kiel atesto de tio, ke tiu ĉi provo sukcesis, estis multaj kontribuoj, faritaj por la revuo dum 12 jaroj (1998-2009), multaj novaj aŭtoroj, malkovritaj pere de “Komencanto”.

Ni ĝojis, ke sur la paĝoj de la revuo ni “renkontiĝis” kaj konatiĝis kun tiuj, kiuj subtenis la ideojn de “Komencanto”, konsistigis nian propran rondon de samideanoj kaj fariĝis fidelaj legantoj, kunaŭtoroj, amikoj en Rusio kaj tra la tuta mondo por multaj jaroj.

Ankoraŭ unu unika eltrovaĵo de nia revuo estis la rubriko “Kiel tio komenciĝis”, dank’ al kiu ni havis eblecon konatiĝi kaj komunikiĝi kun interesege elstaraj personoj de la Esperanto-mondo. Grandan dankon al ĉiuj eminentuloj, kiuj afable reeĥis al nia peto skribi por la revuo kaj rememori siajn komencan paŝojn en nia Esperanta afero! Estis agrable por ni, ke la unua gasto de nia rubriko estis Boris Kolker, per kies lernolibroj ni mem lernis la lingvon, kaj la lasta gasto de “Kiel tio komenciĝis” iĝis Vladimir Opletajev, homo, kiu multe subtenis nian revuon per siaj materialoj, kiu estas nia malnova kaj fidela amiko kaj multjara instruisto de Esperanto. La rubriko “Kiel tio komenciĝis” kolektis pli ol 30 historiojn de la esperantistiĝo de famaj esperantistoj el ĉiuj kontinentoj. Espereble historioj de ilia esperantistiĝo, postaj aktiva esperantista agado kaj atingoj sur la Esperanto-kampo estis ne nur interesaj sed ankaŭ utilaj por la legantaro, instigis la novulojn esti pli aktivaj kaj entuziasmaj, montris sencon engaĝiĝi en la esperantistan movadon. Do tiel, “Komencanto” kun la entuta kvanto de 78 kajeroj kunigis sub sia kovrilo tekstojn, verkitajn de famaj, tutmonde konataj, tre spertaj esperantistoj kaj de malkuraĝaj novuloj, farantaj siajn komencajn paŝojn en nia lingvo.

Dum la tuta eldonperiodo la revuo penis ankaŭ klerigi komencantojn, rakontante pri la historio de la Esperanta literaturo, pri diversaj Esperantaj periodaĵoj, pri multaj esperantistaj organizaĵoj, pri Pasporta Servo ktp. Ĉiam ekzistis gramatika rubriko kun prezento de tre variaj materialoj: tio povis esti iuj amuzaj taskoj por memstare ekzerciĝi en la lingvo kaj kontribuoj de Esperanto- eminentuloj, ankaŭ materialoj, verkitaj de legantoj. Dum pli ol 3 jaroj la gramatika rubriko havis sian konstantan aŭtoron – Ĵan-Luk' Tortel (Francio), kiu senavare liveris serion de “Gramatikaj babiladoj”, kiu estis fakte preta originala lernolibro por progresantoj.

Same agrabla estis por ni apero de la rubriko “Simboloj de la landoj”. Legantoj de “Komencanto” ankaŭ ŝatis tiujn revuerojn kiel ”Diversaj ondoj el bunta mondo”, “Humuraj paĝoj”, “La Praktiko”. Kaj eĉ la tradicia rubriko “Korespondu!” neatendite por ni iĝis tre bezonata kaj praktike uzata.

“Verkoj de niaj legantoj” estis konstanta metiejo por komencantaj aŭtoroj – unu el celgrupoj de nia revuo. Por ni, redaktoroj, estis

grandega ĝojo kaj plej plaĉa premio por nia laboro vidi poste eldonitajn libroforme verkojn de kelkaj el la aŭtoroj, kiuj iam debutis en “Komencanto”: “Rakontoj por diversaj aĝoj” de Luiza Carol, ”Simboloj de Rusio” de Vladimir Opletajev, libron kun la verkoj kaj desegnaĵoj de Santi Elena Bullo, librojn de Ĵan-Luk' Tortel, poemaron de Nikolaj Neĉajev k.a. Rakonto pri nia laboro pri la eldonado de “Komencanto” estis publikigita en la revuo “Esperanto”. En 2005 aŭtune Japana Esperanto-Instituto invitis Viktoron kaj min prelegi kaj rakonti pri nia revuo dum la nacia Esperanto-kongreso, okazinta en la urbo Jokohamo, kiu sekvontjare gastigis jam la 92n Universalan Kongreson de Esperanto. Ankaŭ tiuj ĉi faktoj konstatis utilecon kaj sukceson de nia laboro pri la revuo kaj ĝojigis nin, redaktorojn.

Kun vera plezuro mi rememoras nun tiujn jarojn de nia krea laboro pri “Komencanto” kaj volas kompari nian periodaĵon kun malgranda lanterno, kiun ni strebis kaj sukcesis lumigi por multaj Esperanto-novuloj. Espereble ĝia lumo helpis al ili vidi varian kaj grandegan Esperanto-mondon de multaj flankoj, entuziasmigis por Esperanto-kreado kaj agado.

*Raja Kudrjavceva*







Interkona vespero. EsPrimo-9, Tjumeno, 01. majo 2013



Viktoro raportas kadre de Peĉa-kuĉa.  
EsPrimo-9, Tjumeno, 02. majo 2013

## Ĉe Diabla rokaro

La organizantoj de KER-ekzameno en Jekaterinburgo decidis inde ripozigi nin – la stresitajn ekzamenitojn – kaj ĝuigi nin malavare per uralaj naturbelajaĵoj. La 11-an de junio 2012 ili sukcesis dum varma sunriĉa tago irigi dudekon da scivolemaj paŝantoj en la montetan arbaron apud la fervoja stacio Isetj.

Iniciatis kaj planis itineron de la piedira marŝo Viktoro Kudrjavcev, kiu estas fervora turisto, bona konanto kaj esploranto de ĉirkaŭaĵoj. Ĉiusomere li migras al riveraj kaj arbaraj kaŝejoj por malkovri neordinarajn lokojn kaj pli bone ekkoni la naturon de la Urala regiono.

Dekdukilometra ir-revena marŝo por spertaj turistoj povas esti nur bagatela promeno, sed por multaj el nia ripozgrupeto la ascenda vojo en la humida arbara varmo evidentiĝis ŝvitiga tasko, kiel ekzemple, por nevidantaj jekaterinburgaj esperantistoj Lena kaj Eŭgeno, heroe paŝintaj kune kun aliaj preter ŝtonegoj, falintaj arbotrunkoj, trans marĉetojn ĉe rojoj. Krome ni estis avertitaj pri la akara danĝero, kiu malgraŭ niaj preventaj zorgoj tamen abrupte realiĝis per iksoda atako al unu el la knabinoj.

Kvankam la akarulo provokis ioman panikon, ni ĉiuj volonte piknikis ĉe la fajro, ludis pilkon kaj entuziasme studis la naturan fenomenon “Diabla rokaro”, kiu antaŭ niaj okuloj krute altiĝis surpinte de arbokovrita monto. La granita ŝtonmuro, multe taŭzita pro la venta kaj pluva erozioj, havas nun ekstere kuriozan matracan strukturon, kvazaŭ Diablo mem koboldis ĉi tie, ĉizante bizarajn formojn. La rokĉeno logas por trejnado multajn montgrimpantojn, kiuj senlace konkeras ĝiajn pintojn en la alto de kvar-kvinetaĝa domo. Sed pluraj esperantistoj-kuraĝuloj el nia grupo vizitis la rokaltaĵon, atinginte ĝian pinton de la suda flanko pere de lignaj eskaloj, metitaj ĉe la krutaj ŝtonmuroj. De la kapturna altaĵo ili salutis en Esperanto fotopretajn gapantojn ĉe la murpiedo malsupre.



La vojo returne estis malpli streĉa, ĉar ni pli multe descendis deklivojn, sed reatinginte la fervojan stacion, ni ĉiuj sentis laciĝon de la piedoj, kiuj venigis nin al la loko neforgesebla pro sia natura beleco. Dankon al la jekaterinburganoj, aparte al Viktoro Kudrjavcev, por la agrablaj kaj distraj marŝoj kaj piknikoj. Junio 2012  
*Vladimir Opletajev*





Viktoro boatveturas sur la pitoreska urala rivero Ĉusovaja, 2008



Junio 2012









Ralf Jalming, Viktoro, Raja. La 88-a UK, Svedio, Gotenburgo, julio 2003





## Neforgesebla vojaĝo al Japanio

**Raja Kudrjavceva:** Antaŭnelonge ni revenis el mirinda kaj ĝuinda vojaĝo al Japanio, kien ni estis invititaj partopreni la 92-an Japanan Esperanto-Kongreson en la urbo Jokohamo. Ĝis nun aperas antaŭ la okuloj bildoj de travivitaj dumkongresaj momentoj kaj de vizititaj belegaj lokoj, en la kapoj svarmas ekzotikaj japanaj nomoj kaj apartaj vortoj – ja tiom da neforgeseblaj impresoj restis kun ni! Nin impresis multo: kaj la kongreso mem, tre zorge preparita kaj altnivele okazigita; kaj la bela havenurbo Jokohamo, kiu gastigis tiun ĉi aranĝon kaj ankaŭ akceptos la partoprenontojn de la 92-a UK en 2007; kaj la postkongresa kultura programo kun vizitoj al multaj vidindaĵoj.

**Viktoro Kudrjavcev:** Unue mi rakontu pri la kongreso, dum kiu ni havis unikan ŝancon komunikiĝi kaj amikiĝi kun multaj japanaj esperantistoj, vidi, kia estas la japana Esperanto-movado, aŭdi, kiel japanoj parolas Esperante. La kongreso okazis dum tri tagoj, la 21-an–23-an de oktobro, kun partopreno de 370 esperantistoj. Sed aliĝintaj kaj pagintaj la kongreskotizon estis 550. Laŭ bona tradicio de japanaj esperantistoj, eĉ ne povante pro diversaj kialoj ĉeesti la kongreson, ili tiel subtenas la landan Esperanto-movadon.

Unue nin impresis elektita de la organizantoj tre bela kaj taŭga kongresejo – impona renesancstila palaco en centro de la urbo kun granda kongreshalo, vasta salono por libroservo, aparta ekspoziciejo, kun prelegejoj kaj pluraj ĉambroj por fakkunvenoj. Belegaj vitraloj kaj olepentraĵoj interne de la kongresejo plezurigis niajn rigardojn. La konstruaĵo estas registrita kiel unu el gravaj historiaj monumentoj de Japanio. Ĉi tie okazis la Japanaj Esperanto-Kongresoj jam kvarfoje: en 1980, 1985, 1990, 2005.





Alia bona impresio estis la plej vizitata eksponejo, nome la libroservo. Eniri tiun trezorejon kaj vidi tiom da titoloj – ĝojigis nin! Ni vidis, kia granda prepara laboro estis farita de jokohamaj samideanoj: speciale eldonita Kongreslibro, riĉe ilustrita “Gvidlibro pri Jokohamo”, mapo de la urbo ktp kaj aranĝitaj interesaj ekspozicioj pri la historio kaj nuntempo de la landa esperantista movado.

Ĉio estis bone pripensita: loĝado (en proksime situantaj komfortaj hoteloj), manĝado (matenmanĝoj en hoteloj kaj antaŭviditaj lunĉoj por ĉiuj dum la taga manĝpaŭzo), ekskursoj, kiujn gvidis Esperanto-ĉiĉeronoj, kaj la programo. Certe, atente prizorgitaj praktikaj flankoj ankaŭ sukcesigis la kongreson.

La programo de la kongreso estis varie planita, tiel, ke ĝi efike uzis la kongrestempon por konatigi kaj proksimigi, informi kaj klerigi, instigi kaj entuziasmi la partoprenantojn. Dum la Solena malfermo la kongresanojn salutis vicurbestro de Jokohamo. Poste sekvis salutparoloj de la movadgvidantoj kaj de eksterlandaj esperantistoj; okazis sufiĉe lakone prezentita raporto pri la esperantista movado en Japanio far la estro de organiza fako de Japana Esperanto-Instituto. Ankaŭ estis anoncitaj premiitoj de speciala premio “Osaka” pro aktiva Esperanto-agado kaj granda kontribuo al la evoluo de Esperanto (la premion ricevis s-ro Yamasaki Seiko) kaj de belarta konkurso (s-ino Aida Yayoi). Ĉarme elpaŝis koruso de lernejanoj, kiuj kantis kelkajn kantojn Esperante kaj fine ĉiuj partoprenintoj kunkantis “La Esperon”.



Aparte kortuŝitaj ni estis pro unuminuta silenta preĝo omaĝe al la forpasintaj dum la jaro japanaj esperantistoj. Iom deflankiĝante ĉi tie de la rakonto pri la kongreso, mi devas rimarkigi, ke danke kaj estime memori pri ĉiuj, kiuj lasis bonan spuron en la japana esperantista movado, kaj ĝenerale atente rilati al la historio – estas unu el impresaj ecoj de la japana esperantistaro. Dum la sekvaj kongrestagoj ni povis

vidi, kiel japanaj esperantistoj gardas memoron pri Alphonse Mistler, kiu la unua enkondukis Esperanton en Japanion. Dum la pieda ekskurso tra la urbo okazis speciala vizito al lia tombo ĉe la tombejo por alilandanoj. Same multloke, en diversaj urbaj muzeoj, ni povis vidi librojn kaj fotojn de Vasilij Eroŝenko kaj ofte aŭdi bonajn vortojn pri li.

Sed mi revenu al la kongreso. Sub la temo “Rekonu, Esperanto nun!” la kongreso okupiĝis pri diversaj movadaj, lingvaj, klerigaj demandoj; okazis multaj prelegoj, oficialaj kunsidoj, fakaj kunvenoj, konversaciaj rondoj, ekzamenoj ktp. Estis ankaŭ programeroj, kiuj celis evoluigon de novuloj. Ni mem gvidis konversaciajn rondojn por komencantoj kaj devas diri, ke paroligi la alilingvanojn estas aparte interesa sperto.

Ni eksciis, ke jokohamaj esperantistoj atente flegas kontaktojn kun ĝemelaj urboj de Jokohamo. Krom nia duopo kaj unu samideano el Mongolio, ili invitis ankoraŭ tri eksterlandajn esperantistojn, kiuj reprezentis tiujn urbojn: Ŝanhajo (Ĉinio), Odeso (Ukrainio) kaj Konstanco (Rumanio). Ĉiuj eksterlandanoj faris interesajn prelegojn. En nia prelego pri la temo “Estonteco komenciĝas hodiaŭ. Ni laboru kaj esperu” ni, laŭ propono de la invitintoj, rakontis pri nia poresperanta agado kaj nia revuo “Komencanto”.

Dum la kongreso okazis ankaŭ kunsido de Landa Kongresa Komitato, dediĉita al la preparado de UK-92 en Jokohamo en 2007. Konstateblis, ke jam nun japanaj esperantistoj aktive preparas sin al la estonta evento. Oni organizis por ni ŝipekskurson kun vizito al la estonta kongresejo de UK-92 en Jokohamo. Ni povis vidi la belaspektan konstruaĵon en formo de velo kaj konkoj, kiuj estas unikaj simboloj de Pacifiko-Jokohamo. Tiu ĉi konstruaĵo estas unu el la plej grandaj kongresejoj en la mondo. Krom laboraj momentoj dum la kongreso estis ankaŭ la distraĵoj: dum la unua vespero okazis amika koncerto, dum kiu tipe japanaj programeroj, kiel kimono-vestiĝo en danca formo kaj japanaj kantoj Esperante prezentitaj, alternis kun elpaŝoj de eksterlandaj gastoj, sonis ĉinaj kaj mongolaj kantoj en Esperanto, sekvis gaja ukraina popola danco ktp.

La duan vesperon okupis bankedo en granda ĉina restoracio kun senĉesa vico de ekzotikaj pladoj; agrabla nebrua muziko, plenumata per nekonataj muzikiloj, inklinigis al leĝera interhoma komunikado. Tie, ĝuante senĝenan etoson kaj harmoniplenan kunestadon, ni simple forgesis, ke ni estas en fremda por ni lando kaj sentis nin inter amikoj.





La kongreso fakte diversmaniere imitis UK-ojn. Sed ĝi havis ankaŭ specifajn trajtojn. Ekzemple, dum ĝi, diference de niaj REU-kongresoj, ne okazis longdaŭra raport-reelekta parto, ĉiuj balotoj estis faritaj perrete kaj koresponde jam antaŭ la kongreso, kaj en tio partoprenis ĉiuj membroj de la landa organizaĵo. Krome, ni al kutimiĝintaj jam al komuna kantado gitar-akompane dum niaj Esperanto-aranĝoj, sentis mankon de ĝi, ĉar por ni la komuna kantado ja estas ankaŭ parto de interkomunikado.

Al mi plaĉis, ke dum la solena fermo oni jam kurte raportis pri farito dum la tri tagoj, pri elspezitaj por tio monrimedoj kaj ĝenerale oni faris resumojn de la okazigitaj aferoj. Plej escepta tamen estis, ke okazis jam prezento de Esperanto-grupo el urbo de sekvontjara japana Esperanto-kongreso. Esperantistoj el Okayama invitparolis kaj plenumis kelkajn kantojn. Krome, inter la kongresdokumentoj jam estis eldonita prospekto pri ilia urbo. Fine okazis simbola transdono de la kongresa standardo, simile al UK-tradicio. Post la fino de la kongreso ĉio tre rapide, dum malpli ol unu horo, estis kune ordigita, ĉiuj ekspozicioj malmuntitaj, multego da libroj pakita ktp, kaj la granda teamo, ĉi-foje nur la organizantoj, gaje iris por festi la sukceson de la aranĝo en japanan restoracion. Ankaŭ ni estis invitetaj...

**Raja Kudrjavceva:** La kongreso estis, certe, estiminda ekzemplo. Antaŭ kelkaj monatoj ni mem kunorganizis ĉi-jaran REK-on en nia urbo Jekaterinburgo, tial ni kun granda intereso partoprenis tiun ĉi kongreson kaj atentis multajn ĝiajn flankojn. Ne sen bona envio ni konstatis, ke eblas kunveni tiom da homoj, okazigi ĉion en tiom plaĉaj kaj oportunaj kondiĉoj kaj fari tiel, ke ĉio funkciis glate, kiel bona japana horloĝo. Ni gratulis japanajn esperantistojn pro la profesia organizado de la aranĝo kaj vere sukcesa, kreiva kongreso. Mi multe pensis, kio ebligis tiun okulfrapan sukceson de la aranĝo? Kaj mi opinias, ke ĉio sukcesis dank' al organiza unueco, kapablo kunagadi kaj granda entuziasmo de la japana esperantistaro. Kaj ankoraŭ dank' al disciplinemo kaj granda respondeco de ĉiuj – ni povis vidi, ke estis taskitaj ĉiuj aktivuloj, kaj ĉiu tre respondece plenumis sian taskon. Bona, sekvinda ekzemplo!

La dumkongresaj impresoj estas nur unu parto de niaj impresoj entute. Alia granda parto estas ligita kun la dumsemajna postkongresa restado en Japanio, dum kiu ni povis plene ĝui varmecon de internacia amikeco kaj gastis en hejmoj de jokohamaj esperantistoj, kie ni plezure spertis japaneskan vivmanieron. Al ni plaĉis japanaj dometoj, kutime ne tre grandaj kaj duetaĝaj, kun malgrandaj japanstilaj ĝardenoj, ofte kun facile moveblaj muroj ene kaj ne tro ŝarĝitaj per mebloj pro bonaj dorm- kaj sidkutimoj. Ĉio estis nekutime interesa por ni: dormi sur tatamo, manĝi per bastonetoj, ktp. La manĝkutimoj ankaŭ plaĉis al mi, ĉar la japanoj manĝas multe da fiŝoj, marproduktoj, algoj, legomoj – tre utilaj por la homo. Rizo valoras kiel pano. Salon anstataŭas soj-saŭco. Nun preskaŭ ĉie en la mondo estas japanaj restoracioj, sed nur en Japanio ni povis ĝui verajn japanajn bongustaĵojn: “sasumi”, “susi”, “miso”-supon ktp.



Kompreneble, ĉi tie eblas ankaŭ aprezi la te-ceremonion. Por ni speciale estis organizita vizito al tre bela japanstila ĝardeno “Sankeien”, kie troviĝas la Domo de te-ceremonio, konstruita en la deksepa jarcento. Ĝenerale por fari la tutan klasikan ceremonion oni bezonas kvarhoran tempon, dum kiu oni ĝuas malstreĉan kaj komfortan etoson de te-kuirarto kaj interkominikado. La ĝardeno mem estas ege bela loko, kie regas trankvilo kaj kvieto kaj tempo kvazaŭ haltas. Nekompareblaj naturaj pejzaĝoj inklinigas al poezio, tial ĉi tie ofte okazas kunvenoj de hajkoŝatantoj. Ni havis plezuron ankaŭ ĉeesti tiun kunvenon, aŭdi hajkojn de japanaj verkistoj kaj eĉ prezenti proprajn hajko-provojn (tiu programero estis antaŭplanita kaj ni povis prepariĝi). Fine de la vespero oni donacis al ni por la memoro belajn orkolorajn ventumilojn kun per hieroglifoj surskribitaj tekstoj de niaj hajkoj.



Kun plezuro ni povis vidi, ke en la moderna kaj rapide progresanta Japanio tamen estas tio, kio restas sama, kiel antaŭ centoj da jaroj – tio estas la nacia kulturo kaj la zorge konservataj popolaj tradicioj. Tio estas belegaj malnovaj temploj, kiuj ankaŭ montras la antikvan ĉarmecon de Japanlando. Min tre impresis speciale organizita tuttaga ekskurso al la urbo Kamakura, iama antikva ĉefurbo de Japanio. Kamakura famas pro siaj belegaj temploj kaj estas perlo de malnovstila japana arkitekturo kun harmonia kombino de diversgrandaj pagodoj kun tegolaj tegmentoj, fleksitaj al la ĉielo ĉe anguloj, de diversformaj pordegoj kaj multaj trairejoj. Ĉiujn tiujn grandiozajn kaj majestajn templojn ne eblas priskribi kaj elvoki per tio la amajn sentojn, kiujn ili kreas en realo, necesas simple vidi tion. En la korto de unu el sanktejoj altiĝas granda bronza statuo de Budho. Ĝi estis iam origine lokita en la interno de la templo, sed la templo detruigis pro granda cunamo, postlasinte nur la grandegan Budhon, kiu impresas forte kaj neordinare.



Ni vizitis ankaŭ la intereseĝan, historiplenan urbeton Odavara. La plej rimarkinda loko ĉi tie estas Palaco-fortikaĵo, loko, kiu memoras kiel ĉi tie loĝis kelkaj dinastioj de japanaj kavaliroj – samurajoj. Nun ĉi tie estas muzeo kun multaj eksponaĵoj de tiu tempo. Oni povas eĉ surkapigi unu el mirindaĵoj de la ekspozicio – kapvestaĵon de samurajoj, kaj tio plene translokas onin en tiun malproksiman epokon.



Sed el ĉiuj mirindaĵoj plej elstaras naturaj belaĵoj. Admirindaj japanaj ĝardenoj kaj parkoj kun lagetoj kaj riveretoj, kun aĵuraj fontetoj, kun simpataj laŭboj, pavilonoj kaj terasoj, estas tre allogaj lokoj. Oni povas dum horoj vagi ĉi tie, kunfandiĝante anime kun la naturo. Kaj ĝuste ĉi tie oni trasentas kaj komprenas la spiriton de tiu ĉi lando, kiu estas unuiĝo de la antikveco, naturo kaj vere modernaj teknologioj. Mi pensis ankaŭ, ke verŝajne la

japanoj povas trovi tiun bezonatan ekvilibron inter la moderna vivo kun ĉiuj komfortebloj kaj samtempe tre streĉa kaj stresa por homo, kaj vivo malrapida, kontempla, en unueco kun la naturo – eble en tio kuŝas unu el sekretoj de plej longa averaĝa vivodaŭro de la japanoj. Mi povus ankoraŭ multon rakonti pri pluraj vizititaj lokoj kaj vidindaĵoj kiel pri historia muzeo Edo-Tokio, muzeo de la originala luktarto sumoo ktp.

**Viktoro Kudrjavcev:** Nur kelkajn vortojn mi volus aldoni pri Japana Esperanto-Domo, kiun ni vizitis en Tokio. Ĝi estas kvinetaĝa (!) konstruaĵo, sidejo de Japana Esperanto-Instituto kaj enhavas: oficejon kun komputiloj kaj oficaparataro, libroservon, salonojn por kunsidoj kaj kursoj, bibliotekon, arkivon kun multaj raraj libroj kaj revuoj. (Kaj tiu kvinetaĝa konstruaĵo estas propraĵo de Japana Esperanto-Instituto!) Estis tre agrable vidi sur la breto de periodaĵoj ankaŭ “Komencanton”, zorge binditan ekde la unua numero de 1998. La direktoro de JED s-ro Isino Yosio afable konatigis nin kun la strukturo de la Domo, regalis per teo kaj petis skribi kelkajn vortojn en la libron de eksterlandaj gastoj.

Sed la plej elstara nia impresoj restas la grandanimeco kaj gastameco de japanaj esperantistoj, kiuj tre varme akceptis nin, afable gastigis, akompanis, konatigis nin kun sia lando kaj kulturo! Ni povas nur fini per la vortoj: ne preterlasu la bonan okazon viziti tiun ĉi mirindan landon, nepre partoprenu en la 92-a Universala Kongreso en Jokohamo en 2007 kaj ĉion vidu propraokule.

2005

*Raja Kudrjavceva*  
*Viktoro Kudrjavcev*

## “Nenio sur Tero trapasas senspure...”

Estas multaj belaj vivepizodoj, kiujn mi pense retravivas, rememorante pri Viktoro. Ekzemple, kiel min ofte povis agrable surprizi liaj donacoj, faritaj okaze de iu festo aŭ la naskiĝtago. Li rapide komprenis, ke min ne tre ravas oraj juvelaĵoj, kiuj kutime ĝojigas multajn virinojn, kaj pli sincere mi ĝojas al iu muzikdisko aŭ libro, kiun mi deziris havi, aŭ ricevi bileton al spektaklo, kiun mi revis vidi, aŭ, se li donacis vojaĝon al loko, kiun mi ŝatus viziti k.t.p. Kaj mi plurfoje ricevadis tiajn agrablegajn donacojn: jen bele eldonitan poemaron de mia ŝatata poeto Bulat Okuĝava, jen la albumon kun la pentraĵoj de mia ŝatata pentristo Amedeo Modigliani, jen la muzikalbumon kun diskoj de argentina tango de mia ŝatata Astor Piazzolla. Ne trovinte ĝin en la muzikvendejoj de Jekaterinburgo, Viktoro tiam faris specialan mendon en Moskvo kaj post unu monato ricevis la atendatan pakaĵon.

En mia naskiĝtago kaj en printempa virina tago min ĉiam ĝojigis luksa florbukedo, kiun li klopodis aĉeti frumatene kaj starigi en florvazon ankoraŭ ĝis mia vekigo. Sed plej kortuŝis min ĉiam tiuj buketoj, kiujn li printempe ofte kunportis post siaj matenaj kuradoj ekstere: tio estis la plenbrako de paduso, siringo, jasmeno aŭ simpatiaj buketoj de leontodoj kaj miozotoj, kolektitaj de li ie en herbejeto.

Foje el novaĵoj de la televida kanalo “Kultura” mi eksciis, ke nia ŝatata kantisto Aleksandr Gradskij, kies kreadon aprezis kaj mi kaj Viktoro, finis sian tridekjaran laboron pri la opero “Majstro kaj Margarita” kaj eldonis ĝin kiel muzikalbumon kun la libreto kaj la kvar aldonaj kodiskoj kaj eĉ sukcese prezentis ĝin en sia teatro. Kiel mi revis havi ĝin! Sed estis dirite, ke la eldonkvanto de tiu registrita opero estas tre malgranda, kaj la komponisto kaj kantisto ne planas ĝian vendadon en vendejoj kaj muzikbutikoj. Tiam Viktoro provis kontakti la moskvan esperantiston Grigorij Arosev, kiu laboris en la TV-kanalo “Kultura”, kaj petis lin helpi akiri la registraĵon de la opero, sed post ioma tempo ankaŭ la moskvano respondis,  
ke tio ne realas.







Jekaterinburgo,  
julio 2004

Pasis duonjaro post la prezentado de la opero en Moskvo, kiam okazis la 60-jara jubileo de A. Gradskij. Oni invitis lin kun la koncerto viziti Jekaterinburgon, kaj la 14-an de februaro 2009, ĝuste en Valentena tago, estis lia sola koncerto en nia varietea teatro. Viktoro sukcesis aĉeti biletojn al tiu koncerto, ni kuniris kaj ĝuis la vesperon, kaj fine de la koncerto la kantisto subite anoncis, ke li kunveturigis nur kvin ekzemplerojn de tiu muzikalbumo, pri kiu mi tiel revis. Ĝia kosto estis sufiĉe granda en tiu tempo, sed Viktoro senhezite diris, ke li kuros aĉeti ĝin post la koncerto. Jes, li ĝenerale estis tre malavara homo! Kaj jen, mi jam staris kun la valora donaco en la mano! Ĉu necesas diri, kian feliĉon mi sentis tiumomente? Kaj post nia vojaĝo al Japanio, kiam mi ankoraŭ longe nostalgiis pri tiu ĉi bela lando, li donacis al mi ravan japanan servicon por teŭmado... Jes, li scipovis surprizi! ...

Aprilo 2024  
*Raja Kudrjavceva*

## Aforismoj pri revoj kaj mirakloj, kolektitaj, esperantigitaj kaj publikigitaj de Viktoro Kudrjavcev en “Komencanto”

Viktoro ne preteratentis saĝajn kaj spritajn pensojn. Li ŝatis ŝerci, kalemburi, esprimi sin per sencoriĉaj eldiroj, aforismoj kaj volonte peris aforismojn ankaŭ al la legantoj.

Revoj estas planoj en la kapo, sed planoj estas revoj sur papero.

Revi oni povas eĉ pri tio, pri kio estas malpermesate pensi.

*Georges Malkine*

Se revi - do revi, ne limigante sin en io ajn...

*Hudij*

Homoj vizitas kinejon por spekti la saman revon por ĉiu.

*Bernardo Bertolucci*

Nun pli ol revo el or'  
taŭgas la fer' de l' labor'!

*Kalocsay Kálmán*

Tio, kion oni volas, ĉiam ŝajnas nepre bezonata.

*Marie von Ebner-Eschenbach*

Estu ĉio! Sed tamen io ne sufiĉu.

*Miĥail Ĵvaneckij*

Iluzioj, kiel la dentoj, malaperas kune kun travivitaj jaroj.

*Smith*

La mondo estas ne nur mirinda, ĝi estas eĉ pli mirinda ol ni povas imagi!

*Gheorghe Dej*

Mirakloj ekzistas tie, kie oni kredas ilin, kaj ju pli forte oni kredas,  
des pli ofte ili okazas.

*Denis Diderot*

Sukceso estas konstanta preteco uzi ŝancon.

*François Théodore Dubois*

Homoj senĉese pensas pri morgaŭa tago, kvazaŭ ili ne vivas sed prepariĝas  
al la vivo.

*Lucius Seneca*





Viktoro Kudrjavcev kun gejunuloj. EsPrimo-9. Tjumeno, majo 2013



## Cervaj rojoj – Olenji ruĉji

La unuan de septembro 2013 esperantistoj de Jekaterinburgo, danke al Viktoro Kudrjavcev kaj liaj sugestoj pri unikaj uralaj lokoj, realigis la malnovan revon – viziti la parkon “Cervaj rojoj” – tiun naturan trezoraĵon de Uralo kaj samtempe bele adiaŭi la ĉi-jaran someron. La parko situas en Sverdlovskaja provinco, proksime de la urbeto Niĵnije-Sergi, ĉe la bordoj de la rivero Serga, proksimume 130 km okcidente de Jekaterinburgo. Ni luis komfortan buson, kaj la vojo estis nekutime glata, tial baldaŭ ni atingis la pitoreskan anguleton de la urala naturo, kiun oni ofte nomas “Urala Svisujo”.

Veninte, ni ekvidis, ke “Cervaj rojoj” estas vere eksterordinara loko kun mirinda naturo. Krom granda arbaro kun multegaj padoj kaj aero, infuzita per herbaj, pinaj kaj abiaj odoroj, abundis rokoj kun naturaj kavernoj. Por marŝo tra la parko eblis elekti inter malgranda (7-kilometra) kaj granda (15-kilometra) rondoj, kaj nia grupo decidis realigi la 15-kilometran ir-revenan marŝon. Do, ni devis nemalmulte piediri tiutage!

Estis varma sunriĉa tago, kaj ni gaje paŝis tra la arbaro, ĝuante freŝan aeron, aŭskultante la kantadon de birdoj kaj plezure ripozante de la urba bruoj kaj tumulto. Tre agrablis unuigi kun la naturo kaj senti sin ĝia parteto. Sur la padoj de la parko multis malgrandaj brunokoloraj arbaraj ranetoj, kuraĝe saltantaj preskaŭ ĉe la piedoj, kaj ni tre timis surpaŝi ilin hazarde. Baldaŭ ni ekvidis preskaŭ fabelan lignan dometon, sed evidentiĝis, ke tie eblis aĉeti boteleton da akvo aŭ malgrandan memoraĵon pri la loko.



Laŭ la vojo ni entuziasme studis ĉiujn atingitajn naturajn vidindaĵojn: la plej grandan en nia regiono kavernon, kiu nomiĝas “Druĵba” (Amikeco), apud kiu nia grupo ĝoje fotiĝis, la rokon “Trinkanta ĉevalo” kaj la faman skulptaĵon “Anĝelo”. En nia regiono estas unu el 17 tiaj skulptaĵoj, manfaritaj en Svedio kaj jam starigitaj en diversaj elektitaj lokoj de la mondo. Ĝenerale, laŭ la tutmonda projekto, nomiĝanta “Anĝelo de komuna espero”, oni planas disloki tra la mondo entute 49 anĝelojn, por konstrui apartan spacon, kiu helpas defendi Pacon sur nia Tero.

Foje la vojo daŭris sur la montetoj, tiam desupre bone videblis belegaj pejzaĝoj sube kaj la meandrantaj riveroj Serga, foje ni iris sur pendopontoj, kiujn povis samtempe surpaŝi ne pli ol 5 homoj.

Fina punkto de la turista promenado tra la parko estis grandioza natura kavbo – profundaĵo en granitaj tavoloj kaj amasoj. La profundaĵo “Proval” aspektis vere nereale kaj iom fabele. La plej kuraĝaj personoj el nia grupo enprofundiĝis al ĝia plej malsupra punkto.

Ĝuante la kunripon, nia dekkvinpersona grupo pasigis en la parko la tutan tagon. Tiu ĉi kuna vojaĝo sendube utilis por ni ĉiuj kaj ne nur pro tio, ke la naturo malavare reŝargis niajn cerbojn kaj animojn per pozitiva energio, sed ankaŭ pro tio, ke ĝi pli forte unuigis nin.

Oktobro 2013  
Raja Kudrjavceva  
Viktoro Kudrjavcev





Ekskurso de jekaterinburgaj esperantistoj al la parko "Cervaj rojoj",  
01. septembro 2013





Amo-tago en la Domo de amikeco. Jekaterinburgo, febrero 2008





La 88-a UK, Svedio, Gotenburgo, julio 2003



Jekaterinburgo, 2010





Jekaterinburgo, la 125-jariĝo de Esperanto, 2012







En la literatura kvartalo, Jekaterinburgo, 2009





En arbaro, septembro 2010



Ĉe uralaj sorpujoj, Jekaterinburgo, 2012



## Kurtaj radio-teatraĵetoj

Ĉi tiujn mallongajn kaj spritajn teatraĵetojn vi povas uzi kiel distraĵon dum esperantistaj klubkunvenoj aŭ aliaj Esperanto-aranĝoj .



— Amiko mia, ĉu vi povas pruntedoni al mi \$ 10000?

— De kie mi ilin prenu? “Mi ne estas ja bankisto!”

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Estas mi esperantisto”**.

\*\*\*

Desegnaĵo el “Komencanto”  
de Maksim Smagin

— Kie vi estis, mensogulo?

— Mi drinkis kun la amikoj en drinkejo.

— Sed de kie sur viaj vangoj estas spuroj de virinaj lipoj? (Aŭdiĝas: Frap’! - frap’! - frap’! - frap’! - frap’!!!)

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Sep vangofrapoj”**.

\*\*\*

Foje mi estis en la lando, kie ĉio estas verda—la grundo estis verda, la akvo estis verda, la domoj estis verdaj, la ĉielo estis verda, la noktaj steloj estis verdaj, la pano kaj kolbasoj estis ankaŭ verdaj...

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Rememoroj de 100%-a esperantisto”**.

\*\*\*

—Kara mia, mi volas fari vin feliĉa!

—Kaj vi edziĝas al mi, ĉu?

—Ho jes, certe!

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Kredu min, sinjorino!”**

\*\*\*

—Karulino mia, ĉu vi volas, ke mi metu la tutan mondon al viaj piedoj?

—Jes, kara!

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Iluzioj”**.

\*\*\*

—Kara mia, kie vi estas?

Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton **“Gerda malaperis!”**

\*\*\*

## Kurtaj radio-teatraĵetoj

—Kara mia, akceptu de mi tiujn belajn florojn! Ĉu mi povas kisi vin?

— Ah! Kara...

—Kaj por dimanĉo mi invitas vin ripozi en la naturo...

—Estas tre agrable!

*Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton “Paŝoj al plena posedo”.*

\*\*\*

—Amiko mia, mi vidas, ke vi konstruas novan domon.

—Jes, mi jam faras la fundamenton.

—Estas bona fundamento! (frapetas per la manplato laŭ brikoj).

—Hej, ne tuŝu la fundamenton, ĝi povas disfali!

*Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton “Netuŝebla fundamento”.*

\*\*\*

Du konatoj:

—Amiko mia, mi aŭdis, ke vi vizitas kurson de la internacia lingvo Esperanto?

—Ho, jes!

—Por kiu celo vi ĝin bezonas?

—Por fariĝi Prezidanto de Esperanto-klubo!

*Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton “Superforta ambicio”.*

\*\*\*

En turista agentejo.

—Mi volas akiri ekzotikan vojaĝturneon.

—Se vi volas viziti misteran ekzotikan landon, lernu la internacian lingvon Esperanto, kaj la tuta mondo okazos antaŭ vi!

*Voĉo el radio: Vi aŭskultis la teatraĵeton “Vojaĝo en Esperanto-lando”.*



Viktoro Kudrjavcev



## Pri la ĝenro “Anekdoto”

Ekde la komenco de la eldonado de “Komencanto” en ĝi ekzistas rubriko “Anekdotoj”, kiu laŭ enketo inter la legantoj estas unu el la plej ŝatataj rubrikoj. Hodiaŭ ni iomete profundiĝos en la historion de tiu populara ĝenro. Anekdoto - mallonga kurioza aŭ sprita rakonto, ofte biografia (PIV). Sed antaŭe oni nomis anekdotoj tiujn verkojn, kiuj ne estis eldonitaj. Anekdoto - negranda ŝerca rakonto de diversspeca enhavo kun neatendita sprita fino (Granda Sovetia Enciklopedio). Plej ŝatataj herooj de anekdotoj ĉe la antikvaj grekoj estis filozofoj kaj “skolastikuloj” - pseŭdosciencistoj.

Unu filozofon oni foje demandis, kio estas la subtera mondo? "Atendu iomete, mi skribos al vi de tie", - respondis li.

Skolastikulo, dezirante ekkuŝi dormi kaj ne havante kusenon, ordonis al sia servisto meti sub la kapon kalikon. Al la vortoj de la servisto: "Ja estos dure!" - respondis: "Plenigu ĝin per lanugo!"

En la 6-a jarcento aperis libro de konstantinopola historiisto Procopius Caesarensis “La sekreta historio”, dediĉita al la skandala kroniko de la imperiestra korteganaro. Post la apero de tiu ĉi libro per la vorto “anekdoto” oni komencis nomi diversajn klaĉojn kaj onidirojn el la vivo de konataj personoj. Kaj ekde apero en la 14-a jarcento de la novelaro de *Giovanni Boccaccio* “Dekamerono” “anekdotoj” oni komencis nomi kurtajn historiojn, kies celo estis ne instruado kaj edifo de legantaro, sed nura distrado. Tiu ĉi ĝenro de anekdotoj rapide disvastiĝis en Eŭropo, komencis aperadi pluraj libroj.

En la rusa literaturo la unuaj kolektoj de anekdotoj estis eldonitaj en la 17-a jarcento sub la titolo “Ridindaj rakontoj”. Unu el la plej popularaj herooj de anekdotoj de tiu epoko estis la rusa caro *Petro la Granda*. Anekdotojn pri li ankoraŭ dum lia vivo publikigis eldonata en tiu tempo la angla revuo “Spectator”.

En la parlamenta kunsido, aŭskultante aferojn pri ŝtelado, Petro la Granda ordonis al ĉefprokuroro Paŭlo Jaguĵinskij: "Tuj skribu en mia nomo ukazon, ke se iu ŝtelos ion por la sumo, kiu sufcos por aĉeti ŝnuron por lin pendigi, tiu, sen plia esplorado, estu mortekzekutita per pendigo!" — "Via Imperiestra moŝto, ĉu vi volas resti tute sola, sen civitanoj kaj servantoj? Ni ĉiuj ŝteladas, nur iuj malpli, kaj aliaj pli rimarkeble,"- rezonis la ĉefprokuroro. La Imperiestro, aŭdinie tiun originalan respondon, ekridis kaj lasis la temon.

Kiu rakontis tiujn kurtajn rakontojn kun neatenditaj finoj? Ĉe plejmulto da anekdotoj ne eblas trovi aŭtorojn. Ŝajnas, ke “anekdoto” ŝvebas en la aero – kiu “kaptis”, tiu “elpensis”. Tute ne hazarde similaj anekdotoj “materiigis” ofte samtempe en diversaj mondopartoj. Mondkonata verkisto-sciencfikciisto *Isaac Asimov* eĉ traktis anekdotojn kiel iujn mesaĝojn, kiujn sendas al la teranoj misteraj aliplanedaj civilizacioj, por kontroli nian intelekton.

Kaj tamen trovi “spurojn” de la apero de anekdotoj foje eblas. Ekzemple, de kie aperis serio de anekdotoj pri “Armena radio”?

Armenan radion oni demandas: "Kial iuj viroj estas dikaj kaj aliaj maldikaj, kvankam ĉiuj ili manĝis tute samajn makaroniojn?" – "Ĉar iuj manĝis ilin laŭlonge kaj la aliaj - laŭlarĝe", - estis respondo.

En la 60-aj jaroj de la pasinta jarcento la plej amasa komunikilo estis radio, en kiu ekzistis tiu ĝenro: respondoj al la leteroj de la aŭskultantoj. Cetere, la demandojn plej ofte elpensadis la ĵurnalistoj mem, por aŭdigi en la radioeteron ideologie korektan respondon. Ĝuste tiam aperis la serio de anekdotoj pri armena radio, evidente pro tio, ke en komenco de la pasinta jarcento estis popularaj tiel nomataj “armenaj enigmoj”, kiuj enhavis absurdajn demandojn kaj same absurdajn respondojn. Sed ekde tiu tempo, kiam la radio cedis sian lokon al aliaj amaskomunikiloj, novaj anekdotoj el la serio “Armena radio” ĉesis aperi.

Ekzistas anekdotoj pri konkretaj situacioj, multaj el ili ariĝas en seriojn. Tiel, en Rusio popularas anekdotoj pri “leŭtenanto Rĵevskij” - brava kaj kuraĝa oficiro, ŝatanto de vino kaj virinoj, al kiu ĉiam okazas diversaj okazintaĵoj. Alia serio aperis pri heroo de la civitana milito en Rusio – *Vasilij Ivanoviĉ Ĉapajev* – ĝi populariĝis post la apero en la 30-aj jaroj de la pasinta jarcento de la kinfilmo “Ĉapajev”.

Estas populara serio de anekdotoj pri fama detektivo *Sherlock Holmes*, monde konata heroo de la verkoj de *A. Conan Doyle*. Antaŭ dudeko da jaroj aperis serio pri tiel nomataj “novaj rusoj” - novaj riĉuloj, kiuj rapide kaj neatendite riĉiĝis, sed restis interne “nerazitaj traboj”...



Ni scias, ke estas en la mondo konataj serioj pri gabrovanoj kaj skotoj, serio “El Stultul’ Vilaĝo”, ekzistas anekdotoj pri kuracistoj kaj pacientoj. Pri edzoj kaj edzinoj. Pri policistoj. En ĉiuj landoj kaj en ĉiuj lingvoj plejmulto da anekdotoj estas pri kelneroj, ĉu ne?

Unu bona anekdoto egalas al 15 aldonaj minutoj de la vivo, forprenitaj de laboro!

2006

Skeĉo de Viktoro kaj Raja.  
EsPrimo-2,  
Jekaterinburgo,  
majo 2004



## Pri rilatoj inter viroj kaj ...inoj

El la kolekto de ŝercoj de Viktoro Kudrjavcev

— Pardonu, sinjoroj, hodiaŭ mi havas la unuan en la vivo rendevuon kun junulino. Cu vi ne scias, kiom da tempo ĝentila viro devas atendi sian damon?  
— Vera ĝentila viro devas atendi sian damon eĉ eterne!  
— Kelkaj, ekzemple, atendas la tutan vivon. Kaj, interalie, estas kontentaj pri tio.

— Cu vi scias, amikoj, kiam mi vidas belan junulinon, mi forgesas pri ĉio cetera.  
— Eĉ pri tio, ke vi estas edziĝinta?  
— Ĉu mi estas edziĝinta?  
— Tute certe.  
— Jen, karulo... Mi diris ja, ke mi pri ĉio forgesas.

Edzino al sia edzo:

— Mi sentas min terure, mi dikiĝis kaj aspektas malbele. Faru al mi komplimenton.  
La edzo:  
— Via vidkapablo estas preskaŭ perfekta.

Novedziĝinta viro demandis sian edzinon:

— Cu vi edziniĝus al mi, se mia patro ne heredigus al mi riĉaĵojn?  
— Kara, — dolĉe respondis la virino,  
— Mi egale edziniĝus al vi, ne gravas kiu ajn heredigus al vi la riĉaĵojn.

La unua amo estas la plej feliĉa - ĝi malofte finiĝas per geedziĝo.

— Sinjoro, mi estas tre hontema kaj... Ĉu vi povas konsili, kiel estas pli bone konatiĝi kun junulino sur la plaĝo?  
— Nu, la plej bona maniero konatiĝi estas salti en akvon kaj savi junulinon, kiu dronas.  
— Kaj se ŝi ne volas konatiĝi kun mi?  
— Nu, tiam pardonpetu kaj naĝu reen.

— Panjo, kial fianĉo kaj fianĉino tenas sin man-al-mane?  
— Tio estas la tradicio. Boksistoj antaŭ lukto ankaŭ premas manojn unu al la alia.

— Mi aŭdis, sinjoro, ke vi ĉi-jare planas edziĝi? Ĉu tio veras?  
— Nu, principe, mi tion planis... Tamen printempo jam finiĝas — sed mi, ho ve!, ĝis nun ne enamiĝis.  
— Kia problemo! Enamiĝu somere!  
— Ne, kara, somere mi jam planis divorci.

Mia edzo kaj mi divorcis pro religiaj kialoj: li opinias, ke li estas Dio, sed mi ne opinias tion.

Ĉe maljuna viro estas mortanta la edzino. Ŝi demandas lin antaŭ la morto: — Kara, diru al mi, ĉu vi edziĝos al mia ĝemel-fratino?  
— Trankviliĝu, karulino. Certe mi ne edziĝos al ŝi. — Kial?  
— Vi scias ja, ke ne ekzistas virino pli bona ol vi. Sed la saman mi ne volas .

## Bondeziroj el la tuta mondo

La redakcio de “Komencanto” ricevis multajn gratulojn kaj bondezirojn okaze de la jaro 2006. Kelkaj gratulintoj, kiuj turnis sin al la redaktoroj kaj legantoj de la revuo, jam ne vivas. Sed iliaj vortoj, konsiloj, sugestoj, alvokoj kaj rezonoj restas ĉiam aktualaj...

**Roman Dobrzyński** (Pollando)

Ĵurnalisto, aŭtoro de la libro “La Zamenhof-strato”

Karaj ĉiuspecaj komencantoj! Mi bondeziras al vi per fragmento de la poemo de la Nobelpremiito *Wisława Szymborska*. Ĝia originala pola titolo estas "Nenio dufoje okazas". Mi tradukis ĝin sub la titolo:

### **La eterna komenco**

Cio fluas, ĉiam, ĉie,  
Sen komenco kaj senfino.  
Ni naskiĝas senkonscie  
Kaj forpasas sen rutino.

*Sanon kaj sukcesojn!*

**Vladimir Samodaj** (Rusio)

Honora Membro de UEA, redaktoro de “Scienco kaj Kulturo”

Estimataj legantoj,

mi, esperantisto kun 48-jara sperto, deziras al vi neniam cedi al tiuj personoj, kiuj eble penas konvinki vin pri malutilo de Esperanto, pri stulta perdo de tempo, kiun vi elspezas por ĝia lernado. Tiu lingvo estis kreita, por ke homoj de diversaj nacioj havu rimedon de bona interkompreno, paco kaj amikeco, do ĝia utilo por la homaro estas senduba, ĉar ĝi brile funkcias kaj efike servas la destinitajn por ĝi celojn.

Por bone posedi la lingvon ne forgesu multege legi en ĝi kaj krei proprajn verkojn - ĉu prozajn, ĉu poeziajn, ĉu sciencajn - tiamaniere vi partoprenos pluan evoluigon de nia mirinda interkomprenilo. Ne forgesu ankaŭ multe uzi la lingvon parole, partopreni diversajn esperantistajn aranĝojn lokajn kaj internaciajn.

*Sanu kaj prosperu ĉiam kaj en ĉio!*

*Vladimir Samodaj*

**Michel Duc Goninaz** (Francio)

Membro de la Akademio de Esperanto, Direktoro de Franca Esperanto-Instituto

Karaj,

al la redaktantoj, kunlaborantoj kaj legantoj de “Komencanto” mi sendas plej sincerajn bondezirojn por la jaro 2006. Mi esperas, ke via tre utila revuo plu prosperos kaj plenumos sian celon progresigi la lernantojn de nia lingvo kaj diskonigi la verkojn de novaj aŭtoroj. Neniu devas esti "eterna komencanto", sed ni ja ĉiuj estas konstantaj lernantoj.

*Michel Duc Goninaz*



### **Anatolij Ionesov** (Uzbekio)

Fondinto kaj direktoro de la Internacia Muzeo de Paco kaj Solidareco en Samarkando

Estimataj kolegoj-komencantoj!

Bonege, ke de jam de kelkaj jaroj ekzistas "Komencanto", revuo, sur kies paĝoj ĉiuj komencantoj de la mondo povas senti sin hejme. Ni devas fieri (kial ne?), ke ni estas komencantoj, ja ĉio surtere (kaj supozeble ankaŭ ekstertere!) startas de la komenco, sen komenco estus nenio, ĝuste komenco impulsas la vivon kaj ĉion ceteran. Sed, laŭ mi, vera komencanto povas esti konsiderata nur tiu, kiu konstante perfektigas sin intelekte kaj spirite, alproprigante novajn konojn pri diversaj fakoj, polurante sian parolkapablon kaj verkstilon, evoluigante sian kreivan potencialon ktp.

Tute ne hazardas la saĝa popola diraĵo "Komenco bona - laboro duona". Do, multajn bonajn, agrablajn kaj fruktodonajn komencojn al vi en 2006 kaj, nature, ankaŭ en postaj jaroj!

### **Baldur Ragnarsson** (Islando)

Verkisto, tradukisto, membro de la Akademio de Esperanto

Estimataj samideanoj, jam nova jaro. La 119-a jaro en la historio de Esperanto. Aŭ prefere en la vivo de Esperanto. Ĉar Esperanto estas vivanta lingvo. Ĝi vivas en la mensoj kaj la agoj de la esperantistoj. Ĝi vivas en la potencialoj de sia strukturo. Ĝi vivas en la egalrajteco, kiun garantias ĝia neŭtraleco. Sian vivecon ĝi ŝuldas al sia iniciatinto, L.L. Zamenhof, kiu havis la intuicion doni spiriton al la lingvo, taŭgan por porti ĝin pluen al ĉiam pli fekunda vivo. Esperanto estas lingvo de liberigo kaj tiun liberigon ĝi transdonas al ni, kiuj amas tiun lingvon, ĝin uzas kaj per ĝi kreas serve al demokrateca interkomunikado. Mi deziras al la legantoj de "Komencanto" prosperan novan jaron kaj abundon de ĝojigaj momentoj.

*Baldur Ragnarsson*

### **Renato Corsetti** (Italio)

Prezidanto de UEA

Karaj legantoj de "Komencanto", mi devas supozi, ke vi estas komencantoj, kvankam mi pensas, ke pluraj el vi estas komencintoj.


Esperantisto, kiun mi multe estimis, diris foje, ke la vera problemo de Esperantujo ne estas la ekzisto de tro da eternaj komencantoj sed la malekzisto de tro da komencantoj.

La forto de grandaj lingvoj, iam la franca, nun la angla, morgaŭ la ĉina, kuŝas en tio, ke ili havas amasegon de eternaj komencantoj. Ĉiuj vendistoj en Romo, kiuj provas vendi al turistoj, konas la numerojn kaj kelkajn aliajn esprimojn en la angla. La samo okazas tra la mondo.

Ci tiu komenca babilado celis nur diri al vi kiom estas gravaj komencantoj, alivorte vi. Vi estas gravaj ankaŭ pro via novula entuziasmo. Vi havas ankoraŭ entuziasmon voli koni Esperantujojn, legi nian literaturon, debati pri tio, ĉu oni devas diri "la pordo estas fermita" aŭ "la pordo estas fermata". Unuvorte vi estas la vivanta sango de nia komunumo.

Pro tio mi ŝatas vin (kaj malŝatas la veteranojn kiel min - sed bonvolu ne diri al ili). Pro tio mi sendas al vi multajn bondezirojn okaze de la nova jaro.

*Amike, Renato Corsetti*



Viktoro Kudrjavcev — lernanto de la unua klaso, Niĵnjaja-Salda,  
lernoĵaro 1965-1966



## Julio Baghy

Verda stelo sur la brusto  
Iom palas pro la rusto.  
Mi ne estas purigisto  
Estas mi esperantisto.

Kuŝas ie sub tegmento  
Netuŝebla Fundamento.  
Tuŝu ĝin nur la Mefisto;  
Estas mi esperantisto.

Polv-kovrite sur bretaro  
Putras mia SAT-vortaro.  
Tedas min la vorto-listo;  
Estas mi esperantisto.

Gramatikon mi ne konas  
Kaj gazetojn ne abonas.  
Librojn legu la verkisto,  
Estas mi esperantisto.

Mi parolas kun rapido:  
“Bonan tagon, ĝis revido”  
Ĝi sufiĉas por ekzisto,  
Estas mi esperantisto.

Pionirojn mi kritikis,  
La gvidantojn dorne pikis  
Kaj konspiras kun persisto;  
Estas mi esperantisto.

Por la venko mi esperas,  
Sed nenion mi oferas,  
Mi ne estas ja bankisto,  
Estas mi esperantisto.

Se baraktas en la krizo  
La movado, organizo  
Helpas mi nur per rezisto,  
Estas mi esperantisto.


Flugas per facila vento  
El la buŝo Nova Sento.  
Ĝi sufiĉas por sofisto;  
Estas mi esperantisto.

Post la mort' ĉe tombo mia  
Staros “rondo familia”.  
Nekrologos ĵurnalisto:  
“Estis li esperantisto”.

## Estas mi esperantisto



Zamenhof-festo,  
Jekaterinburgo, 2012






# Memorlibro

## Viktoro Kudrjavcev

### 2024

Viktor Vasiljeviĉ Kudrjavcev (1957 – 2014) – elstara rusa urala esperantisto, propagandisto de Esperanto, fervora kursgvidanto, redaktoro, movada aktivulo. Tiu ĉi PDF-formata memorlibro, kreita de geamikoj kaj kolegoj okaze de la dekjara mortodatreveno de Viktoro en 2024, figuras lian personecon de homo neordinara, dediĉinta multajn jarojn de siaj vivo kaj agado al Esperanto kaj esperantista komunumo.



Raja Kudrjavceva  
[komencanto.r66@ya.ru](mailto:komencanto.r66@ya.ru)

Vladimir Opletajev  
[surborde@mail.ru](mailto:surborde@mail.ru)

Pavel Veselov  
[pav.tmn@gmail.com](mailto:pav.tmn@gmail.com)

© Raja Kudrjavceva

Jekaterinburgo –

Tjumeno –

Surguto

Majo

2024